

eLIBRO

Aleksandro Ŝarov

*Pizulo
kaj
Simplulo*

I N K O



Aleksandro Ŝarov

PIZULO KAJ SIMPLULO

Tradukis el la rusa: Andreo Ĥiĵnjak

© Ŝarov A., heredintoj. Teksto, 1973

© Razgon L., heredintoj. Antaŭvorto, 1985

© Ĥiĵnjak A. Traduko, 2003

eLIBRO

Aranĝis: Franko Luin

ISBN 91-7303-207-7

inko@omnibus.se

<http://www.omnibus.se/inko>

AŬGUSTO 2003

Enhavo

Fidela kavaliro de infaneco	5
1 Al kvar flankoj	21
Foran vojon	21
La mirakla kunligaĵo	23
La Princino kaj Kolombo	26
Granda Maestro	29
2 Mi fariĝas disĉiplo de fabelisto Metr Ganzelius	32
Lunaj hometoj	36
Mi studas la ecojn de la rosguto kaj ekscias la historion de reĝo Buf' la Naŭa	42
Mia arkana revo	50
3 La Magistro, Tondilo kaj Luno	53
Mi ekscias, ke amo estas pli forta ol timo	53
En la mistera urbo	57
Mi rekonas la sorĉiston Turroputo	61
Mi konatiĝas kun Aĥumdus Aĥum	69
Aĥumdus klerigas la racion	74
La Princino renkontiĝas kun La Ŝtona Junulo	77

La horloĝo iras inverse	85
4 La urbo de egalaj hometoj	88
Glacia prizono	88
La magia ŝlosileto	95
5 Se vi amas, la rev' plenumiĝos!	99
Sub la kaŝtanoj	99
La fino de la rakonto pri la Princino kaj Junulo	104
La lasta batalo kontraŭ Turroputo	106
6 La reveno al la Instruisto kaj la adiaŭo	111
La pliiĝilo	111
La Instruisto	114
Pri la tradukinto	119

*Fidela kavaliro de infaneco*¹

Aleksandro Ŝarov forpasis du monatojn antaŭ sia 75-jariĝo. Kaj li komencis publikiĝi jam fine de la dudekaj jaroj, kiam li studis en la Moskva universitato. Tio signifas, ke lia laboro en literaturo daŭris pli ol duonjarcenton. Nun, kiam finiĝis la viva kaj literatura vojo de la verkisto, oni povas fari la unuajn resumojn de tiu ĉi granda, tre bela kaj nobla vivo.

Aleksandro Ŝarov naskiĝis la 25-an de aprilo 1909 en Kievo en familio de profesiaj revoluciistoj. En la infanaĝo li vivis malfacile kaj feliĉe. Malfacile, ĉar li multajn malfacilaĵojn spertis en la jaroj de la civita milito, de malsato kaj detruo; feliĉe, ĉar li sukcesis lerni en rimarkebla lernejo-internulejo, fondita de olda bolŝeviko, amiko de V. I. Lenin — Pantelejmon Nikolaeviĉ Lepeŝinskij. En tiu lernejo laboris miraklaj pedagogoj, kiuj por la tuta vivo sugestis al la estonta verkisto grandegan respekton al instruista laboro, amon kaj atenton al tiu granda afero. En sia biografio Aleksandro Ŝarov diris, ke tiuj

1 Estis skribita por la libro: A. Ŝarov. Volŝebniki priĥodjat k ljudjam. Moskva. "Detskaja literatura", 1985.

jaroj estis por li la ĉefaj, difinintaj lian tutan estontan vivon. Sed tion ni scias kaj sen la konfeso de la verkisto, sufiĉe trarigardi ĉion verkitan de li por kompreni: en la infanaj jaroj de Ŝarov ekzistas preskaŭ ĉio, kio poste speguliĝis en la libroj, kiujn li verkis.

Aleksandro Ŝarov studis en la biologia fakultato, sed malgraŭ sia amo al scienco li ne fariĝis sciencisto — li fariĝis ĵurnalisto kaj verkisto. Li laboris en la ĵurnaloj "Izvestija" kaj "Pravda", ĉirkaŭveturis la tutan landon kiel ĵurnalisto, flugis en Arktikon, verkis eseojn pri esplorstoj, sciencistoj, kuracistoj. Kaj la jarojn de la milito, de la komenco ĝis la fino, li pasigis sur la fronto. Liaj unuaj libroj komencis aperi dum la Granda Patria Milito. Sed nur post ĝia finiĝo komenciĝas la granda literatura debuto de la aŭtoro de la libro "Sorĉistoj venas al homoj".

Li laboris en multaj literaturaj ĝenroj. Li verkis romanojn, rakontojn, publikaĵojn, fantastikon, fabelojn . . . Li havis legantojn de ĉiuj aĝoj: de etuloj, por kiuj li verkis rimarkindajn fabelojn, ĝis tiuj plenkreskuloj, kiuj estis absorbitaj de serĉadoj, dramoj kaj atingoj de la nuntempa scienco. Aleksandro Ŝarov ŝatis verki pri homoj, kies profesio mem entenas aspiron al vero, amon kaj kompaton, — pri scienculoj, kuracistoj kaj pedagogoj. Unu el liaj unuaj grandaj libroj, "Vivo venkas", estas dediĉita al virecaj kuracistoj, kiuj kun risko por propra

vivo serĉis kaj trovis rimedojn kontraŭ la timinda malsano — pesto. Kaj en la libro "La unua batalo" li rakontis pri drama batalo de sovetaĵ esploristoj kaj kuracistoj kun la plej malfacilaj virusaj malsanoj, pri tiuj, danke al kiuj milionoj de infanoj estis savitaj de la poliomiĉito.

Aleksandro Ŝarov estis homo de kristala skrupulo, de granda estimo al vorto, de fideleco al verkista destino kaj al la granda ideo de sia verkado. Sen ia trograndigo oni povas diri, ke tiu gvidanta ideo ĉiam estis protekto de infaneco, senlima amo al infanoj.

Unu el la plej ĉefaj libroj de Ŝarov titoliĝas "Lando de infaneco". Verŝajne li donis la titolon al tiu ĉi libro, rememorinte la vortoj de Saint-Exupéry: "Mi venis el infaneco kiel el lando." Aleksandro Ŝarov en tiu ĉi lando loĝis konstante, neniam el ĝi forirante — pri kio ajn li verkadis. Ĉiuj liaj pensoj, ĉiuj voloĵ kaj esperoĵ — ĉio estis ligita kun tiu ĉi lando. Preskaŭ en ĉiuj libroj la verkisto malrapide enrigardas infanecon. En sian kaj en tiun de siaj samaĝuloj. Li konstante pensas pri tiuj, kiuj nun loĝas en tiu ĉi lando, kaj tiuj, kiuj loĝos en ĝi. Ĉar tiu ĉi lando estas la plej granda, sed ankaŭ la plej tenera, la plej senmorta, kaj la plej vundebla. Infaneco — tio estas aĝo, kiam la homo sorbas en sin ĉiujn pensojn, farbojn, sentojn de la ĉirkaŭanta mondo. Nenio pasas senpure preter la infano. Tio restigas "spuron de io mirinda, al

neniu komprenebla, glitinta en animon de homo, en ĝustan fundamenton de ĝi por kuŝi tie, en la animo, ĝis tempolimo, kaj poste ĝermi neniuj scias per kio: verso, amo, scienca eltrovo aŭ simple bona fama ago. Ĝermi per estonteco.”

Aleksandro Ŝarov kune kun tiaj grandaj pedagogoj de la nuntempo, kiaj estis Vasilij Aleksandroviĉ Suĥomlinskij, kaj en Pollando Janus Korczak, juĝis kiel profunde nepravan la opinion pri tio, ke infanoj nenion produktas, ke ili dume estas — nur manĝuloj. Li skribis: ”Infanoj ankaŭ kreas tion, sen kio ne estas pensebla la mondo, — sin mem, civitanojn de estonteco, mem tiu ĉi estonteco.”

La mondo estas aranĝita tiel, ke en ĝi ekzistas malbono kaj bono, belego kaj hido. Estas bezonate, ke vivante en tiu ĉi mondo la infano ne estus sola, ke ĝi estus antaŭ ĉio ĉirkaŭata de bono, belo, feliĉo. Ŝarov bone sciis tion laŭ sia infaneco. Do kiom da timindaĵoj vidis la verkisto dum la unuaj jaroj de sia infaneco: militon, malsaton, morton de la proksimaj, malicon de la fortaj, humiligon de la feblaj. Kaj kiom do li vidis dum tiuj jaroj da belego: bonkoron, kompaton, memoferon.

Por Ŝarov estas nedisigeblaj la mondo de infaneco kaj la mondo de la plenkreskuloj. Do nur plenkreskuloj povas krei por la infanoj tiu vere feliĉan infanecon, sen kiu

ne povas plenkreski vera, harmonia, bona homo. Ĉe ĉiu infano ĉirkaŭe devas esti homoj, kiuj donas al la infanoj tiun ĉi feliĉon. Verŝajne tial Ŝarov kun tia amo, kun tia tenereco skribas pri sia avino. Ŝi estis por li tia homo. Ŝarov skribis pri ŝi, ke ŝi vidis ”en infera tenebro, kie la okuloj estas senutilaj, sed la koro — la ceteraj, ĝis teruro raraj koroj ĉion vidas . . . Kiel lerneĵo aŭ studento mi legis ĉe Tolstoj, ke la plej belega amo estas amo abnegacianta. Kaj komprenis, ke la avino estis pli belega ol ĉiuj en la mondo . . . En la maljuneco ŝi vivis kiel maro, kiu tage ĝissate nutriĝas de varmo, kaj vespere prodigas ĝin.”

Kiam oni legas la librojn de Ŝarov, oni konsterniĝas pri tio, kiel tiu homo tra la penigan vivon, tra la tragikajn jarojn de la milito, ne disverŝinte, ĝisportis konfidon al la homo kaj homeco. En la libro ”Rakonto pri la dek eraĵoj”, verkita pri liaj kunuloj en la komuno-internulejo, Ŝarov ne provas kaŝi, ke tiuj knaboj kaj knabinoj, seniĝintaj je la gepatroj, ofte sovaĝiĝintaj en mondo de la malzorgataj, tute ne memorigas pri anĝeloj, ke ekzistas inter ili iuj maliciĝintaj, kruelaj, neveremaj . . . Sed li montras, kiel sub la influo de saĝaj kaj bonkoraj plenkreskuloj, sub la influo de kunlutata infana kolektivo, falas de tiuj infanoj la ŝelo de malico, nevereco, ne kiel

timo pri puno, sed tio, kio nomiĝas konscienco, komencas direkti iliajn agojn.

Pli ol ĉio en la mondo Ŝarov malamis ĉion servizaĝitan, unukoloran, grizan. Li skribis: "Ju pli da farboj, des pli bone. Plej timinda estas la potenco de sola griza koloro . . . Nur se oni akumulas sufiĉe da plej helaj koloroj en la infaneco, la provizo sufiĉos ĝis maljuneco." En la naturo, en homa vivo, Ŝarov ŝatis ĉion belegan. Li ŝatis pentradon kaj povis enamiĝinte verki pri pentristoj, kaj la pentraĵoj amitaj de li spiritpleniĝis: ekvivis la homoj, arboj, floroj, sur ili prezentitaj. Ŝarov amis la teatron, mem verkis por la teatro kaj revis, ke infanoj ne nur legu liajn librojn, sed ankaŭ rigardu spektaklojn laŭ liaj teatraĵoj. La ideoj de Ŝarov pri tio, kion bezonas la infanoj por kreskiĝi bonaj homoj, pli ol ĉio speguliĝas en lia rilato al fabelo. Tute ne hazarde por eldono de lia unua postmorta libro estas elektita tiu, kiun li plej ŝatis, laboron pri kiu li daŭrigis kaj post tio, kiam aperis ĝiaj du eldonoj. Liaj ĉefaj opinioj estas esprimitaj en la libro, kiun li titolis "Sorĉistoj venas al homoj".

Tiu libro estas nek esploro, nek kolekto de biografioj. Tio estas rakonto de la verkisto pri la loko de fabelo en la vivo de la homo kaj homaro. Ĝuste de la homo kaj homaro, ne nur de infano, ne nur de infanoj.

Fabelon homoj bezonas konstante. Kornej Ivanoviĉ Ĉukovskij skribis, ke "La celo de la fabelistoj estas . . .

eduki en la homo homecon — tiun ĉi mirindan kapablecon de la homo emociiĝi pri fremdaj malfeliĉoj, ĝoji pri ĝojoj de aliulo, sperti fremdan sorton samkiel la propran.” Homo edukas sin ĉiam, dum la tuta vivo. Sed la ĉefa tempo por li estas tiu, kiam li unuafoje renkontiĝas kun fabelo. Ŝarov pri tio skribas: ”Post la dorso de la okjara infano estas la plej signifa evento en ĝia vivo — ĝi estiĝis homo.”

Tamen la infano estiĝas homo ne per si mem, sed nur komunikante kun plenkreskaj homoj, prenante de ili ne nur la kapablon iri, paroli, priservi sin, sed ankaŭ etikajn normojn.

La plej grandan feliĉon, grandegan bezonon kras en la infano la renkonto en la infaneco kun fabelo kaj fabelisto. Ĝuste tial, ke fabelo por ĉiu normala infano estas la plej bezonata spirita manĝo, ĝi aperis antaŭ ĉiuj verkoj de buŝa kaj skriba literaturo kaj ekzistas ĉe ĉiuj popoloj de nememoritaj tempoj. La literaturo spertis — kiel ĉio en la historio — tre grandajn ŝanĝojn. Mortis iuj ĝenroj kaj aperis aliaj; eĉ la lingvo ŝanĝiĝis tiom, ke nur sciencistoj kapablas kompreni tiun lingvon, kiun parolis kaj skribis homoj en tiu sama lando antaŭ mil jaroj. Sed kiel antaŭe vivas la fabelo kaj kiel antaŭe ekzistas fabelistoj.

Kial tiun libron Ŝarov titolis ”Sorĉistoj venas al homoj”? Ĉar laŭ lia profunda konvinko fabelistoj estas sor-

ĉistoj: ili kreas magion de bono, helpas la malgrandan homon adopti kredon al vero, amo, justeco, espero. Tio ĝuste estas "la mistero de fabelo" — tiel la verkisto nomis siajn meditojn pri la valoro de fabelo.

Kaj fabelistojn por la libro Ŝarov elektis tute diferencajn: kaj tiajn gigantojn kiel Puŝkin kaj Cervantes; kaj Janus Korczak, kies rimarkinda vivo kaj heroa morto pasis antaŭ la okuloj de la Ŝarova generacio; kaj la aŭtoron de "Fabelo pri perdita tempo" Eŭgenon Schwarz. Inter la verkistoj, al kiuj Ŝarov dediĉis paĝojn de sia libro, estas ankaŭ tiuj, kiuj famas en la literaturo kiel aŭtoroj de unu sola fabelo — tio estis P. P. Jerŝov, la aŭtoro de "Ĉevaleto-ĝibuleto". Sed ĉiu el ili restis por infanoj sorĉisto de bono kaj beleco, kiuj estas tre bezonataj en la vivo. "Juĝistoj en la mondo sufiĉas, sed sorĉistoj estas malmultaj, kaj ili baldaŭ pereas de la mano de ekzekutisto aŭ frue mortas sinmortige," — amare skribas Ŝarov.

Tamen fabelo ne fariĝas pli malforta pro tio, ke sorĉistoj-fabelistoj en la mondo ne tiel multas. Ĉiu fabelo posedas tian forton de vero kaj amo, ke kun ĝi nenion povas fari tiuj, kiuj mortigis la fabeliston. En la libro de Ŝarov sekvas unu la alian grandaj miraklofarintoj, kiuj por ĉiam restis en la koroj de la homoj. Estis mortigita la genia Puŝkin; en la aera batalo kun faŝistoj heroe pereis Antoine de Saint-Exupéry; la faŝistoj pafmortigis

la ĉeĥan fabeliston Vladislav Vanĉura; rifuzis lasi la infanojn kaj iris kun ili en la gasumejon Janus Korczak. Sed tio kreita de ili estas pli forta ol la morto. Neniu memoras kaj konas la nomojn de la murdistoj de la fabelistoj, ili ĉiuj similas unu al la alia. Sed neniu fabelisto similas la alian. Kaj pri tio ankaŭ skribas Ŝarov: "Oni ne povas pensi alie, ke se fabelistoj en la mondo tiel belege diversas, jen 'ne fabelistoj' — kaj tio devas esti aparta homa speco — terure egalas."

Kiam Ŝarov skribas, ke ekzistas "aparta homa speco", li subkomprenas la portantojn de kvalitoj, kiujn li opinias kontraŭnaturaj por la homo kaj homaro. Trompo, perfido, krueleco, apatio, mensogo — en ĉiu fabelo, ĉiu fabelisto kondukas kontraŭ ili rigoran militon. Efektive batalo de vero kontraŭ mensogo, de bono kontraŭ malbono konsistigas la enhavon de ĉiu vera fabelo. Rakontante pri vivo kaj verkado de la fabelistoj, la aŭtoro de la libro "Sorĉistoj venas al homoj" konvinkas siajn legantojn, ke amo kaj bono estas pli fortaj, ili kapablas venki malbonon kaj malveron.

Inter teorioj, plej malamataj de Ŝarov, verŝajne plej grandan indignon ĉe li elvokas la opinio de kelkaj homoj (eĉ tiuj, kiuj juĝas sin sciencistoj), ke la krueleco de homo estas origina, ke al la homo, laŭ lia tuta esenco, estas imanenta krueleco al la proksimuloj, malamikeco

al la homoj kaj naturo. Li skribas: "Tiu hipotezo estas spekulativa kaj mensogema, estas kovarda elpensaĉaĵo de falsracio." Ŝarov citas en la libro "Lando de infaneco" vortoj de maljuna instruisto: "Ĉe la plejparto de malicaj homoj, mutilantaj la mondon, en la infanaĝo estas kontuzita la animo — la animo povas kontuziĝi same kiel la pulmo. Krueleco naskas kruelecon — nenion alian. Kaj tiun ĉi ĉenon oni devas ĉesigadi, kie nur eblas."

Kiam oni legas la libron "Sorĉistoj venas al homoj", oni nevole kaptiĝas de la penso, ke tiun ĉi rakonton pri realaj homoj, enirintaj la historion de la mondliteraturo, oni legas kiel fabelon. Tio, kion la aŭtoro juĝas la ĉefaj ecoj de fabelo, penetras ĉiun paĝon de la libro. Sed tio okazas, ĉar la verkinto de tiu ĉi libro mem estas fabelisto.

En biografioj de la verkistoj-fabelistoj, pri kiuj estas rakontate en tiu libro, ekzistas ia specialeco: ili komencis verki fabelojn ne en la komenco de sia literatura vivo, sed multajn jarojn poste. Andersen estis aktoro, verkis versojn kaj romanojn, kaj nur poste komencis verki siajn famajn fabelojn, kaj Aksakov verkis sian solan fabelon "La skarлата floreto" jam estante fama verkisto kaj maljuna homo; travivis vivon de piloto kaj de verkisto Saint-Exupéry. Signife fabelo ne estas tiel facile verkebla. Por fariĝi fabelisto estas bezonataj ne nur strebo al bono,

literatura talento, sed ankaŭ nemalgranda, iufoje tre malfacila vivosperto. Kiel ni scias el la biografio de Ŝarov, el liaj "libroj de rememoroj", li havis tute sufiĉe da tio.

La fabeloj de Ŝarov "Kukolido, princo el nia korto", "Volodja kaj onklo Aljoŝa", "Pizulo kaj Simplulo" kaj multaj aliaj estas plenaj da bono al homoj, amo al la naturo, senfina ĝoja miro pri beleco kaj laŭceleco de la mondostrukturo, da firma kredo al la kapablo de la homo vivi saĝe, bele kaj homece. Tiuj ĉi ecoj de la fabelisto ne nur kuŝas en la naturo mem de verkisto, ili respegulas ankaŭ lian propran vivan sperton. Fabelo ne devas esti simple elpenŝaĵo, ĝi devas nepre apogi sin al reala vivo. La vivo, pri kiu la fabelisto eksciis ne laŭ onidiroj, sed kiun li vidis mem, per propraj okuloj. En unu el siaj verkoj Ŝarov ĝuste tiel skribis: "Fabelisto samkiel esploristo priskribas nur la observitan de li persone." Eĉ pli: "Fabelistoj bezonas provi ideojn de bono kaj justo per reala kreado de justo." Ne eblas imagi, ke homo, kiu en la vivo estus kruela, nejusta kaj starus surflanke de neprava afero, povus verki fabelojn, en kiuj oni sugestas al la infanoj ideojn de bono kaj justo!

Aleksandro Ŝarov estas konvinkita, ke bono estas la granda, ĉiovenka forto. En la antaŭvorto al sia lasta libro, aperinta dum li vivis, la libro de fabeloj "Kukolido,

princo el nia korto”, li skribis: ”Malico iufoje estas forta, sed eĉ tiam oni povas venki ĝin per kuraĝo, amikeco, racio kaj ankaŭ per bona forto de sorĉo kaj sorĉa potenco de bono.” Li havas malgrandan fabelon ”Maljunulo Marmoro kaj Avo Lanugo”. En ĝi certaj senprudentaj homoj ridas pri Avo Lanugo, kiu faras malfirmajn, rapide malaperantajn aĵojn, kiel polenon, kiu flugas printempe en arbaro, aŭ nubojn, verŝiĝantajn per pluvo . . . Sed en la realo, en la vivo ili evidentiĝas la plej firmaj kaj eternaj, ĉar nenio estas pli eterna ol printempo!

Por rakonti al infanoj pri sorĉo, Ŝarov ne turnas sin al io neordinara, supernatura. Por li estas magia ĉio ĉirkaŭ la homo: Rivereto, Sciuro, Fringo, Urso. Magias kaj bonas la arbaro, magias la rivero, kaj Avinjo Testudo instruas sian plej amatan Knabon Leontodon esti sorĉisto. Kaj tio ne tiel malfacilas: oni bezonas turni sin al homoj, al ĉio vivanta per la plej bona, kion havas ĉiu homo. Ĉiuj mirakloj en la fabeloj de Ŝarov okazas ne post tridek naŭ landoj, en nekonata reĝa regno, sed nuntempe, inter ni kaj vi. La ”Fabelo pri la tri speguloj” komenciĝas per tio, ke en ordinara domo ricevas ordinaran unuĉambran loĝejon Dimov, plej ordinara ulo 23-jara. Certe plue evidentiĝas, ke la Domadministranto, doninta al li la ŝlosilon de la apartamento, estas gnomo,

kaj la speguloj en la loĝejo posedas nekredeblajn ecojn, sed fabelo do estas fabelo . . .

En siaj fabeloj la verkisto sugestas al la infanoj, ke en la mondo, en la naturo oni devas vidi ne nur arbaron kaj ne nur herbejon, sed ankaŭ ĉiun arbon, ĉiun herbeton, scipovi distingi en ili la tutan komplikecon kaj ĉarmon de la vivanta kaj sola.

En la fabelo "Volodja kaj onklo Aljoŝa" la plenkreska saĝa kaj bona homo diras al la knabo:

—Do oni nomas vin ne simple knabo.

—Ne, oni nomas min Volodja . . .

—Kaj arbon oni devas nomi laŭ la nomo: saliko, poplo, tremolo, betulo."

Respondante al tiuj, kiuj kun antaŭtimo pensis, ke fabelo povas distri infanon de la reala vivo, Aleksandro Ŝarov admonis ilin, ke por infanoj fabelo estas ludo, ke ili ĝuas fabelon kiel ludo, en kiu realiĝas iliaj revoj, iliaj voloĵoj, ilia neretenebla fantazio. Ĝuste tial ĉiu infano estas belega pentristo, elpensulo, genia filologo. Ŝarov diras, ke ĉiu infano havas sian, laŭ la esprimo de Puŝkin, "magian kristalon". Ĉe plenkreskuloj ĝi akireblas por unu el milionoj, sed en la infaneco ĝin gardas ĉiu infano."

La batalo de Aleksandro Ŝarov por loko de fabelo en la vivo de homo, por tio, ke infano konceptu la mondon

en interesa absorba ludo, ne estas disigebla de lia grandega atento al la vivo de lernejo. En la libro "Lando de infaneco" li rememoris la laboran lernejon de la dudekaj jaroj, rememoris rimarkindajn sovetajn pedagogojn, kreintajn ĝin, rememoris grandajn instruistojn de nia tempo, aspirintaj fari la infanojn feliĉaj.

"Feliĉa infaneco" . . . Iam tiu ĉi nocio signifis nur satan senmalĝojan infanecon, ĝi, tiu ĉi nocio estis pli sociala kaj rilatis al tiuj, kiuj povis materie asekuri al siaj infanoj "feliĉan infanecon". Niatempe ni aspiras kaj faras ĉion eblan, por ke feliĉan infanecon havu ĉiuj infanoj kaj la nocio "feliĉo" estus multe pli larĝa ol la elementa zorgo pri nutraĵoj kaj vestaĵoj . . . La feliĉo de infanoj estas interesa, saturata de beleco kaj spiriteco vivo, ĉirkaŭata de bona atento kaj saĝa zorgo de plenkreskuloj. Sen tiu infaneco ne povas plenkreski harmonia, anime kaj korpe sana homo de la venonta 21-a jarcento. Ŝarov skribis: "Al multaj homoj de la moderna mondo feliĉo ne sufiĉas por tuta vivo . . . Sed feliĉo por tuta vivo akumuliĝas en la infaneco, devas plenkreski." Fabelo ĝuste estas bezona elemento de vera feliĉa infaneco.

La fabelojn de Aleksandro Ŝarov estas legataj kun ĝuo de homoj de ĉiuj aĝoj. Rakontante pri Antonio Pogoreljskij, aŭtoro de la fama fabelo "Nigra kokino", Ŝarov skribas: "La pensoj, sugestitaj per fabelo, kreskas kun la homo, sed ĝia esenco restas antaŭa. Fabeloj memoriĝas

ĝis morto aŭ ĝis kiam homo perfidos sin mem — tio do ankaŭ estas morto.”

La aŭtoro de tiu ĉi libro, Aleksandro Ŝarov, travivis sian vivon, neniam perfidinte sin mem . . .

Lev Razgon²

- 2 Razgon Lev Emmanuiloviĉ, verkisto; naskiĝis en 1908; finis la Moskvan ŝtatan pedagogian instituton en 1932; de 1928 laboris kiel redaktoro de la eldonejo "Molodaja gvardija"; en 1938 li estis arestita, troviĝis en malliberejo ĝis 1955; post reveno al Moskvo li laboris en la eldonejo "Detskaja literatura"; de 1961 en literatura laboro; aŭtoro de multaj verkoj por infanoj kaj junularo, de libroj de dokumenta prozo, "La neelpensita" kaj "Antaŭhieraŭ kaj hieraŭ"; estis membro de la Komisiono por indulgo ĉe la Prezidanto de Ruslanda Federacio; estis membro de PEN-klubo; laŭreato de premio de la nomo A. D. Saĥarov "Pro civitana vireco de verkisto"; forpasis la 8-an de septembro 1999.

Aleksandro Ŝarov

*Pizulo
kaj Simplulo*

Ĉapitro unua: Al kvar flankoj

FORAN VOJON

En tiu jaro la 25-an de junio mi aĝis dek tri. Onjo Elza vekis min matene kaj diris:

—Vi ne plu malgrandas, nun vi devas mem perlabori vian panon.

Mi ektimis. Mi preskaŭ ekploris, sed teniĝis. Onjo Elza ja ne estas malica, sed nur tre malriĉa. Kaj el ŝiaj infanoj unu estas malpli granda ol la alia.

Mi ellitiĝis kaj la lastan fojon rigardis al miaj gekuzetoj. Onjo Elza rostis por adiaŭo plenan paton da terpoj kaj, dum mi manĝis, preparis aĵojn por vojo:

—Jen pura ĉemizo, jen pano kaj lardo. Kaj jen estas la panja heredo: neŝirebla laĉo, neestingebla karbeto, ŝlosilo, tranĉilo kaj kupra groŝo.

Ŝi kondukis min ĝis la arbara vojeto kaj ŝovis en la manojn la kunligaĵon kun la aĵoj.

—Iru al ĉiuj kvar flankoj. Kvankam vi ne altkreskas, kaj per kompreno vin Dio preterumis, eble vi trovos vian feliĉon.

Nur gardu vin — al neniu donu la kunligaĵon!

Mi rigardis al la malnova traba domo sub la pajla tegmento, kie mi loĝis dum dek jaroj ekde la panja morto, kaj iris laŭ la arbara vojeto.

Mi iras kaj pensas: ne tiel povra mi estas. Mi havas puran ĉemizon, panon kaj lardon. Mi havas neŝireblan laĉon, neestingeban karbeton, ŝlosilon, tranĉilon kaj kupran groŝon. Kial panjo lasis al mi la ŝlosilon? Domon mi ja ne havas.

LA MIRAKLA KUNLIGAĴO

Ĉiam pli densa kaj malhela estiĝis la abiaro. Grizaj likenoj pendis de la maljunaj abioj, la pinglaj branĉoj interplektiĝis tiel, ke oni ilin ne trairos. Mi laciĝis, tute perdis la vojon, kiam mi aŭdis: iu iras tra la arbaro — la branĉetaĵo knaras, kaj laŭte kantas:

Turroputo.

*Puto . . . Turro . . .
Por mi ĉio malfermiĝas,
La tuta mondo estas klara.
Bona — stulta! Fia — riĉa!*

Turroputo.

*Puto . . . Turro . . .
Al mi ĉio subordiĝas.
Grizaj lupoj,
Neĝblizardoj.
Mensogemaj vagfajretoj,
Kiuĵ montras la vojeton,
Ne havantan la komencon.
En la fin' — senfunda marĉo
Kaj kaban' sur kokpiedoj.*

Kiel mi ĝojis pri la homa voĉo! Mi eĉ ne atentis, ke la kanteto estas stranga kaj timinda, kaj plenforte kriis:

—Uhu! . . . Uhu!!

En la sama sekundo de post la arboj venis maljunulino kun hokbastono, en blanka tuko. La nazo estis ruĝa, la okuloj cirkraj kiel tiuj de strigo. Pri tio mi ne atentu. Kia oni naskiĝis, tia oni estu.

La maljunulino ridetis, metis fingron al la buŝo kaj flustris:

—Ts! . . . Ĉu vi ne aŭdas, ke ne malproksime vagadas la sorĉisto Turroputo? Feliĉe vi renkontiĝis kun mi, tia mirinde kaj surprize kaj terure bona oldineto. Mi elkondukos vin al la vojeto, ne havanta komencon, en la fin' — senfunda marĉo kaj kaban' sur kok' . . . Ba, mi, maljuna, misbabilis . . . Mi kondukos vin el la arbaro al varmeta dometo, nutros vin per bongusta vespermanĝo, enlitigos vin sur molan kusenegeton. Donu al mi la kunligaĵon — vi ja estas laca, mi vidas, kaj ni eliĝu pli rapide la arbaron, alie estiĝos malhele . . .

Mi memoris la adiaŭajn vortojn de onjo Elza kaj volis kaŝi la kunligaĵon post la dorso, sed ne sukcesis. La maljunulino kaptis la kunligaĵon, sed tuj deĵetis la manon, kriis, blekis, saltis pli alte ol la plej alta pino, turbis tiel, ke leviĝis vento, kiu arkigis la arboj kaj ĵetis min teren, ululis "u-u-u" kaj malaperis.

Mi leviĝis de la tero kaj pensis: ĉu vere mia karbeto estas tia arda?

Mi tuŝis la kunligaĵon, sed ĝi estis tute malvarma, nur iomete lumis. Kaj tio tre konvenis — jam venis nokto, malvarma, venta, neniuj steletoj en la ĉielo.

Mi demandus nian lernejan instruistinon aŭ onjon Elza pri la kunligaĵo — kia miraklo ĝi estas? Ili ja multon scias! Sed neniun mi havas nun por demandi.

La lumo ĉiam fortiĝis. Ŝajnis, ke tute apude iu preteriras, ekodoris kvazaŭ je varmo, kaj blubluaj okuloj rigardis al mi kaj ridetis.

Kio nur ne miraĝos en la malhela abiaro!

Ŝajnis, ke mallaŭta arĝenta voĉo flustras: "La panja testamenta karbeto lumas nur al bonaj homoj. Al malbona homo lumas nur fenestroj de magiulina kabano."

Mi ĉirkaŭrigardis kaj vidis la vojeton. Mi iris kaj iradis laŭ ĝi ĝis kiam mi eliĝis en arbarrandon, kampon. Mi manĝis iom da pano kun lardo, fosiĝis en pajlan stakon, metis sub la kapo la kunligaĵon kaj ekdormis.

Kaj matene mi vidis — proksime, post la kampo estas urbo.

LA PRINCINO KAJ KOLOMBO

La unuan fojon en la vivo mi trafis urbon. Kiom da magazenoj kaj metiejoj ĉi tie, kiom da glaciaĵistoj, kiuj rulas la ĉaretojn, tutvoĉe laŭdante sian varon, kiom da festvestitaj pasantoj; eĉ la kapo rondiris.

Kiel do ĉi tie oni ne trovos feliĉon!

Sed kiun ajn mi demandis pri laboro, ĉiuj forpelis min — kaj glaciaĵisto, kaj botisto, kaj kuiristo. Eĉ la ĉerkisto prikrietis min:

— Iru, iru, malgrandulo. Alie vi ŝtelos ion.

Ĉu ĉerkon mi ŝtelos?!

Mi haltis ĉe tajlorejo kaj pensis: "Nenio fareblas, se oni naskiĝis malfeliĉa."

Subite la Tajlora Majstro mem malfermis la pordon kaj geste logis min. Li havas gravan vizaĝon, la nazo estas ruĝa, preskaŭ brulanta, la okuloj estas rondaj kaj flavaj, kiel tiuj de strigo.

— Kunkudru, — li diris, — ĉi tiujn du pecojn da ŝtofo — la bluan kaj flavan, dudek kudrerojn per la blankaj fadenoj kaj la dudek per la nigraj. Se vi sukcesos, vi estos tajlora submajstro. Donu la kunligaĵon, por ke ĝi ne malhelpu, kaj ek al la afero.

Sed mi, certe, la kunligaĵon ne fordonis.

Kiel bone estas sidi sur alta tablo ĉe hela vitrino kaj ilumi per akuta kudrilo, iufoje rigardante al preterpasantoj.

Mi tre penis, sed apenaŭ mi sukcesis fari dudek perfektajn kudrerojn per blankaj fadenoj kaj sep per la nigraj, kiam laŭ la strato preterpasis — aŭ preterflugis? — ŝajnas, ke ŝi ne tuŝis per ŝuetoj la pavimon — Princino. Kun ora harligo kaj blubluaj okuloj.

Mi tuj rekonis la Princinon, ĉar mi vidis ŝin multfoje en la libro kun koloraj bildoj, kiun antaŭ longe legis al mi panjo.

La Princino estis ankoraŭ pli belega ol tiu en la libro. "Tial ŝi estas tiel mirakle bela, — mi divenis, — ĉar ŝi estas viva, sed ne pentrita."

La Princino turnis al mi la kapon kaj ridetis.

Aŭ ĉu ŝi elŝovis la langon? Miaj manoj malleviĝis, kaj la ŝtofo falis planken.

Mi rekonsciiĝis pro la kolera voĉo de la Majstro:

—Vi nur kornikojn kalkulu!

Mi bone memorfiksitis ĉi tiujn vortojn, ĉar en la sama sekundo preter la tajlorejo flugis blanka Kolombo.

—Ĉu vi vidis la Kolombon? — mi demandis Tajloran Majstron. — Ĉu vi vidis la Princinon?

—Ĥa-ĥa! Mi ja diris, ke vi nur kornikojn kalkulu, —
kriis la Majstro. — Foriĝu! Sed la kunligaĵon mi prenos
pro tio, ke vi damaĝis la laboron.

Li kaptis min, sed mi elturnis min kaj forkuris.

GRANDA MAESTRO

Mi iris, kien la okuloj rigardas, ĝis kiam mi aŭdis dolĉan voĉeton:

—Ĉu vi serĉas laboron, knabo?

Sur la sojlo de rozkolora dometo kun la blua tegolo staris ruĝnaza dikulo kun rozkoloraj vangoj kaj flavaj okuloj.

Li malfermis la pordon, kaj mi ekvidis bluan fortepianon kun levitaflugilo.

—Se vi sukcesos en ekzameno, vi fariĝos disĉiplo de mirinde kaj surprize Granda Maestro, tio estas mia disĉiplo, — li diris, kiam mi sidiĝis sur rozkoloran seĝon ĉe la blua fortepiano. — Por atingi ĉi tiun grandegan feliĉon, vi devas fortepiani la bonstilegan pastoralon, komponitan de mi. Vi devas dudekfoje karesege, pianissimo, tuŝi la blankajn klavojn, kaj poste dekfoje forte, kresĉendo, bati la klavojn nigrajn. Komencu!

Mi tuŝis la blankajn klavojn, kaj la Maestro, klininte la kapon, flustris:

—Dolĉe! Dolĉete! Dolĉege! Plej dolĉe! Delikate! Delikatete! Delikatege! Kortuŝe! Kortuŝege! Superkortuŝege! Iufoje li murmuris sub la nazo:

Turroputo.

*Puto . . . Turro . . .
Por mi ĉio malfermiĝas,
L' tuta mondo estas klara.
Bona — stulta! Fia — riĉa!*

Kie mi aŭdis ĉi kanteton? La Maestro apenaŭ batis per ora kamertono la flugilon de la fortepiano.

—Tiel . . . tiel . . . Ankoraŭ unu peno, kaj vi fariĝos la ŝatateta disĉiplo de mirinde kaj surprize Granda Maestro. Tiel . . .

En tiu tempo preter la fenestro preteriris — aŭ preterflugis — la Princino. Anstataŭ dudekfoje pianissimo tuŝi la blankajn klavojn, mi rapide — vivo, eĉ vivissimo — saltis el la rozkolora dometo de la Maestro.

—Kien vi? — li kriis.

Sed kial mi okupiĝu pri la rozkolora Maestro, ĉiuj maestroj en la mondo: pli gravis ja la Princino.

Super ŝia ora kapo flugis la sama Kolombo.

—Bonvolu, bonvolu ne malaperi, alie mi mortos, — diris mi post la knabino.

Ĝuste tiam ŝi ekridetis.

Sed, eble, ŝi elŝovis la langon, aŭ montris la nazon, aŭ faris grimacon, fariĝinte ankoraŭ pli bela.

Rigardinte al mi, ŝi diris:

—Kiam leviĝos la luno, venu al la granda kverko sur la arbarkampeto, mia knabo! Turnu vin per la dorso al la luno, fermu la okulojn kaj mezuru dudek paŝojn de la kverko al la kampeto, kaj poste dek paŝojn de la kampeto al la kverko.

Ŝi malaperis.

Venis la nokto, leviĝis la luno. Mi faris, kion postulis la Princino, sed ne ekvidis ŝin.

De malproksime alportiĝis la moka voĉo.

—Kun fermitaj okuloj oni ne kaptos feliĉon, mia knabo! Aĥ, mi ordonis?! Do vi ĉiam faros nur tion, kion oni ordonas? Adiaŭ, kaj ne serĉu min.

Tra larmoj mi vidis: tra la arĝenta fosto de la luna lumo flugis la Kolombo. De ĝia dorso saltis panergranda gnomo en ruĝa kalpako.

Ĉapitro dua: *Mi fariĝas disĉiplo de fabelisto*

METR GANZELIUS

Ĉesu ploraĉi, — alportiĝis de ie malsupre. — Pf-pf, ĵus mi naĝis el unu larmo, kaj jen min kovris la dua.

Mi tenis la larmojn.

—Pf, tiel do estas pli bone . . .

Mi ne povis bone vidi la gnomon en la herbo kaj, mi konfesas, ekstreme malĝentile mi vokis lin: — Hej, kie vi tie?

—Prefere ne nomu min "hej, kie vi", sed metr Ganzelius, kiel tio kutimas jam de unu milo da jaroj, inter ĉiuj feinoj, homoj kaj sorĉistoj, kun kiuj mi havas konatecon.

—Pardonu min, metr Ganzelius, — kun pentto mi diris.

—Malfermu la polmon, — ordonis metr Ganzelius, nepacience aŭskultinte la pardonojn. — Ne, tenu ĝin direkte.

La herbo moviĝis, kaj sur la polmon saltis malgranda gnomo kun malhelaj okuloj kaj griza barbeto.

Sur la ŝultroj li havis bluan kapoton. Sur leda zono pendis spado. En la maldekstra mano li tenis ruĝan kal-

pakon kun kvasteto. Akraj ŝuoj kun fleksitaj pintoj lumis per verda lumo.

Li ofte, tutbruste inhalis aeron kaj pro tio pligrandiĝis kaj pligrandiĝis, sed tiel, ke neniu trajto de la vizaĝo ŝanĝiĝis. Salute kliniĝinte, Ganzelius svingis la kapoton kaj saltis al bazo de kverko. La lumantaj ŝuoj, kiel lampiroj, desegnis la spuron en la malhelo.

—Do . . . ĉu tio signifas, vi estas malplena? — perplekse mi demandis.

—Mi estas aera homo, — respondis la gnomo. — En la juneco, kiam mi estis forĝisto kaj pezis dek pudojn kaj kvar funtojn plie, mi ankaŭ iufoje estis prenanta tiel rare renkonteblajn aerajn homojn por malplenaj, kiuj konsistigas la plimulton.

Li rigardis al mi de malsupre supren kvazaŭ kun bedaŭro.

Nun mi komprenis, ke mi sentis tiun ĉi severan demandantan rigardon jam pli frue, kiam metr Ganzelius preterflugis sur sia kolombo. Rigardo de homo, kiu altpreze pagis por tio, kion instruis al li la vivo.

Patro iras kun filo kaj pensas, kiel gardi lin dum la longa vojo. Li kuŝigas en la manon de la infano monujon kun oro, aŭ arĝento, aŭ kupro. Oro, arĝento kaj kupro do per tio distingiĝas de saĝeco, ke ĝin oni povas fordoni al filo kaj amiko.

Ĝi distingîgas de saĝeco kaj amo, kiuj estas nek oraj, nek arĝentaj, nek kupraj, sed nur veraj aŭ la falsaj.

Ĉi tiun instruon de metr Ganzelius, kiel ankaŭ aliajn instruojn de li, mi aŭdis kaj skribis en la kajeron ne en tiu nokto, sed multe pli poste . . .

—Mi konis vian kompatindan panjon, kiam ŝi ankorau estis knabino, kaj certe ne povis permesi al sorĉisto Turroputo persekuti vin.

—Turroputo?! Mi ne vidis Turroputon . . .

—Ne, vi vidis lin! Li transformiĝis jen en la maljunulinon, kun kiu vi renkontiĝis en la arbaro, jen en Tajloran Maestron, jen en la Majstron. Li estas malica kaj forta sorĉisto. Sola mi ne venkus lin kaj mi petis la Princinon helpi min. Okcentjara konateco permesas disponi je malgrandajn komplezojn.

—Ĉu la princino estas okcentjara? — ekkriis mi mirinde kaj aflikte.

—Ni interkonatiĝis kun la Princino antaŭ okcent jaroj, kiam ŝi festis sian ducentan naskiĝtagon, — respondis metr Ganzelius. — Turroputo invadis la palacon, forportis la Princinon en kampon, rondirigis en glacia ŝtormo, kaj se ŝi ne ekvidus la fenestrojn de la forĝistejo — feliĉe la laboro absorbis min ĝis nokto, — kiu scias, kio okazus kun ŝi . . . Ni varmigis la Princinon ĉe la forĝejforno, nur la koro de la kompatinda knabino restis duone frostita. Eble ĝi ankaŭ degelos?! Dum la homo vivas, oni ne

povas perdi esperon. Kaj la Princino estas ankoraŭ nur milcentjara.

Rigardinte al la okuloj kaj diveninte miajn pensojn, Ganzelius triste parolis:

—Amatino, filĉjo, estas nek ora, nek arĝenta, nek kupra, nek bela aŭ malbela, nek juna aŭ maljuna, sed nur amata.

LUNAJ HOMETOJ

Ni iris laŭ pado en la herbejo, metr Ganzelius antaŭe, kaj mi, lia disĉiplo — de tiu ĉi nokto mi do fariĝis lia disĉiplo, — post li.

Mi demandis al metr Ganzelius:

—Kial do tiu fama kaj potenca sorĉisto malamas ordinaran knabon?

—Turroputo malamas ĉiujn, — respondis metr Ganzelius. — Kaj li ĵuris forpreni de vi la panjan heredon.

—Ĉu la kunligaĵo estas vere magia?

La instruisto silentis.

Poste, post multaj tagoj, li diktis al mi, kaj mi skribis en la kajeron liajn vortojn:

Kiel ĝi aperis en la mondo — "la magia"? Kiam via panjo estis mortanta, sur ŝian kusenon falis kiel karbeto la lasta stelo falinta en tiu aŭtuno. Kaj via panjo blovekscitis ĝin, dum en la brusto restis spiro, por ke ĝi lumu al la filo.

Tiel ĝi fariĝis magia, la karbeto, kiu ne estingiĝas.

Kaj kiam via panjo rigardis kaj rigardis al la ŝlosilo, ĝis kiam fermiĝis por ĉiam ŝiaj okuloj, kaj en si preĝis nur

pri unu sola volo: en la plej malfacila minuto tiu ĉi ŝlosilo savu ŝian filon, tiam la ŝlosilo fariĝis magia.

Nur tiel aperas en la mondo tio, kion la homoj nomas magia.

La luno leviĝis alte super la horizonto, estis silento.

Metr Ganzelius ĉiam malgrandiĝis kaj ree fariĝis tiel malgranda, ke mi pene povis vidi lin inter la herbetoj.

Alarmitaj de la paŝoj, aeren startis la dormemaj kokcinoj; mi ektimis, ke iu faligos la Instruiston teren aŭ kaptos lin kaj forportos nesciate kien.

La voĉo de metr Ganzelius interrompiĝis. Tutforte streĉante la aŭdon, mi aŭdis nur lian malfortan lacan spiron. Poste li ree parolis:

—En la juneco, kiam mi estis forĝisto kaj ankoraŭ ne transformiĝis en aeran homon, estis tiel, ke mi amasigis sur unu ŝultro dek pudojn da fero, sur la alia sidigis mian ĉarman edzinjon Ester, kiu ne estas plu en la mondo, kaj sur la dorso ĉiujn niajn dek knabojn . . . Nun por mi estas peza eĉ aero . . .

La arĝenta luno brilis en la ĉielo. Subite mi vidis tre proksime domon el malnovaj traboj, tute muskaj.

Kvadrata fenestro ekbrilis malalte super herbo. La pordo nigris, apogita de forkbastono. Antaŭ la domo kreskis abio, sur ĝi, kroĉiĝinte strobilon, kiel tio kutimas ĉe tiuj birdoj, pendis Krucbekulo.

Sur la firsto de la tegola tegmento aksumis metala ventoflago kun krudfera forĝita drako. Sur la ventoflago, pufiginte la plumojn, sidis granda nigra Korvo kaj la Kolombo, kiun mi tuj rekonis. La Korvo eksvingis la flugilojn, per la beko fortrenis la forkbastonon kaj malfermis la pordon.

Irinte en la domon, mi tre ĝojis, vidinte metr Ganzelius, kiun mi ĵus lasis el la vido.

La Instruisto staris sur la tabula planko, en la fosto de la luna lumo, kie sin ĵetadis, dancis, freneziĝadis miloj de polvoj.

En la domo la luno, ŝajne, lumis ankoraŭ pli brile ol en la herbejo. Ĝia cirkla vizaĝo, ĉu ploranta, ĉu ridetanta, rigardis tra la fenestro.

Antaŭ mi altiĝis la forĝejforno kun la malfermita fajrujo, kie arĝentis cindro. Sur la planko kuŝis disĵetite falĉiloj, glavoj, kiraso, rustaj hufferoj de ĉevaloj-gigantoj, kiujn en nia tempo oni ne plu vidas.

Metr Ganzelius fariĝis jam malpli granda ol fazeolo. Malgraŭ tio mi serene povis vidi lian vizaĝon, kies ĉiu trajto estis lumita de la luno.

—Bonvenon, filĉjo! Aranĝu vin, — diris metr Ganzelius.

Mi vidis lignan liton, kie facile enspaciĝos ne nur unu, sed kelkaj grandeguloj. Apud ĝi staris kverka stumpo de

du brakumoj, sur ĝi sitela kruĉo kaj kandelingo kun fandita kandelo konvena al ĝi.

—Tie dormis mi kun mia edzinjo kaj niaj filoj, — diris metr Ganzelius. — Nun la infanoj estas disvagintaj tra la mondo. Ester mortis pro veo, kiam nia plej juna, la kompatinda Silvero ŝtoniĝis . . . Silvero . . . arĝenta. Ni kun Ester ĉiam revis, kiel mirakla estos lia vivo, sed okazis . . . Estu al vi bone ĉi tie, filĉjo . . .

Mi iris tiuflanken, de kie el duonobskuro alportiĝis la malforta voĉo de la Instruisto. Ĉe la traba muro lokiĝis panergranda dometo.

—Sidiĝu pli proksime, — invitis metr Ganzelius.

Li estis en vatita ĥalato el ruĝa atlaso kaj noktaj pantofloj, kiuj brilegis per verdaj fajretoj, kaj staris, apogante sin kontraŭ dorso de apogseĝo. Sur tableto brulis kandelo; ĝi verŝis tre brilan lumon, kvankam estis malpli dika ol lanugero de leontodo. Lito el glanduono estis kuspita: el sub deĵetita litkovrilo montriĝis kuseno en neĝoblanka koverto.

—Antaŭe oni nomis min "Ganzelius-Monto", poste — "Metr Ganzelius-Aera Homo", nun oni nomas min "Pizulo". Kaj oni nomos "Papavero"?! Kaj poste . . . Kio poste? — malĝoje demandis metr Ganzelius, apenaŭ rimarkeble ridetante. — Strange: vi fariĝas malpli granda, sed vidas pli malproksimen.

La kandelo-lanugero lumis mirinde forte: eble, kaj tra la trabaj muroj, kaj eĉ ĝis la mondorando? . . .

—Kion vi tie vidas? — demandis metr Ganzelius, montrante al la luna radio.

—Polverojn, — demandis mi.

—Kaj nenion plian? — La voĉo de metr Ganzelius esprimis miron kaj ion plian: verŝajne kompaton?

Mi silentis. La okuloj de metr Ganzelius ekbrilegis. Li saltis sur la seĝon, deĵetis la ĥalaton kaj restis en arĝent-aspekta triko.

—O-la-la! — li kriis, svinginte la manojn, kvazaŭ flugilojn, kaj komencis malgrandiĝi.

Li degelis kiel neĝo sub la suno. Tiel rapide, ke mi ek-timis; mi do jam estis amanta la Instruiston.

Nun mi lin tute ne vidis. Nur du verdaj punktoj brulis sur la ruĝa veluro de la seĝo.

—O-la-la! — aŭdeblis la voĉo de la Instruisto. — Rigardu!

La verdaj fajreroj glitis de la seĝo al la luna radio kaj strebis rondiri en opala fosto de la lumo. Kaj apud ĝi mi subite ekvidis multajn panergrandajn vivaĵojn. Ili estis fulmetantaj en tia kapturte ĝoja danco, ke la piedoj mem komencis fari dancaĵojn.

—Brave! — kriis metr Ganzelius. Min ĝojis, ke li observas min: sekve, li ankaŭ ne estas al mi tute indifirenta.

—Kaj do, en la luna radio estas nur polvoj? — reveninte, demandis la Instruisto.

—Certe ne! — ekkriis mi.

Metr Ganzelius ridetis al mia varmegeco.

Jam kuŝante en la lito, li pensoplene parolis:

—Kien ĝi malaperas — la vivantaj en la luna radio? Kiom da fojojn mi provis vidseki ĝian alvenpunkton, sed meznokte dormiĝis . . . La luna radio estas simila al ŝtuparo kun miliono da ŝtupoj. . . Sekve tial ili ĉiam hastas? Oni ja devas ĝis tagiĝo reveni al la luno. Kaj la luna radio ankaŭ similas al puto. Oni povas disrompiĝi, falante en tian profundan puton.

Kvankam la sciencistoj skribas, ke la luno estas kovrita de mola luna polvo. Kaj elfoj, kaj gnomoj, kaj lunaj hometoj ankaŭ rakontas, ke ĝi estas simila al lanuga kuseno. — ”Tie oni bondormas,” — diras ili. . . . Kiom da ili estas — elfoj, gnomoj kaj lunaj hometoj? De la tero tio malbone videblas, sed ĉe plena luno, en serena vetero, la Krucbekulo, kiu havas tiel bonan vidkapablon, kalkulis, ke nur la lunaj hometoj estas ducent kvardek mil kvincent sepdek . . .

—Bonan nokton! — post ioma silento diris metr Ganzelius, kaj mi ne komprenis, kiun li alparolis, li ja rigardis tra la fenestro al la luno, kiu premiĝis al la vitro per sia cirkla vizaĝo. — Bonan nokton, filĉjo! — ripetis la Instruisto.

MI STUDAS LA ECOJN DE LA ROSGUTO KAJ EKSCIAS LA HISTORION DE REĜO BUF' LA NAŬA

Mi vekiĝis pro tio, ke iu fikse rigardis al mi. Malferminte la okulojn, mi ekvidis la Korvon, sed ne ek-timis, ĉar la rigardo de la giganta birdo esprimis nur bonkorecon.

Min, sciante jam, ke ne ĉiuj en la mondo bonkoras unu al la alia, tre kortuŝis la maniero de la Korvo singarde tuŝi per piedoj la litkovrilon, forte svingante la flugilojn, por tiel sori en la aero super mi.

Komenciĝis la frua mateno. Tra la malfermita pordo videblis rando de la suno, levanta de post la herbejo, kie brilis per rosgutoj herboj kaj floroj.

Se ne estus la kariljonado de la floroj, estus tute silente. Aŭdeblis la dorma spiro de la Instruisto.

Vidinte, ke mi vekiĝis, la Korvo klinis la kapon, kva-zaŭ salutis, kaj elflugis. Baldaŭ li revenis, portante en la beko siteleton kun akvo.

Dum mi lavis min, la Korvo prenis de la muro korbeton, ien flugis kaj kuŝiĝis sur la tablon panon, cirklon da vilaĝa kolbaso kaj kruĉon kun degelita lakto.

Mirinde estis tio, ke kiam mi staris sur la sojlo kaj ĉirkaŭrigardis, ĉirkaŭe, kiel povis vidi la okuloj, estis ne nur neniŭ butiko, sed ĝenerale neniŭ konstruaĵo.

En la ĉambreto de la Instruisto, ĉe lia lito estis balanciganta kampanulo, per kulmo fiksita en planko fendo. La Kolombo portadis per la piedoj herbetojn kun grandaj rosgutoj kaj deskuis la gutojn en la korolon de la floro.

Metr Ganzelius, iomete retiriĝinte, ekkuris kaj per la kapo enakviĝis. Ne, neniam mi decidus tiel salti en malvarman akvon.

”Ĉu nepras simila decidemo en mia venonta metio de fabelisto?” — kun angoro mi pensis kaj tuj donis al mi la vorton: — ”Se tiu eco estas nepra, pro iu ajn prezo eduki ĝin en si!”

La Instruisto venis el la akvo, seke frotis sin per vila bantuko kaj vestis sin.

Ni iris el la domo.

— Rigardu la rosguton, — diris la Instruisto, haltante antaŭ alta kampanulo. — Kion vi vidas?

— Min, — diris mi necerte, divenante ial, ke la respondo afliktos la Instruiston.

— Ĉu nur vin?! — severe redemandis la Instruisto. — Kaj tiu ”vi” tie, en la rosguto, estas certe belega, potenca kaj saĝa?

—Certe ne! — "Li", tio estas "mi", — malgranda magra ĉifonulo kun timigita vizaĝo.

—Tio estas jam pli bona! — ekkriis la Instruisto. — Rigardu atente, filĉjo!

Mi klinis min super la floro. La guto kreskis cent-, eĉ milfoje. En ĝia profundo verdis la herbejo, ĉirkaŭkovrita de matena nebulo. El la nebulo paŝis la Princino, sed mi malbone vidis ŝin, ĉar, eble, larmoj de tristo aŭ ĝojo blindigis la okulojn.

—Tie . . . estas la Princino, — balbutante mi diris.

La Princinon ĉirkaŭis elfoj kun diafanaj flugiletoj kaj feinoj. Pli malproksime staris kaj sidis gnomoj; iufoje ili klinis la kapojn unu al la alia kaj interflustris.

—Rigardu aliajn gutojn!

Mi denove vidis min, sed ne klare. Kaj vidis multajn elfojn, feinojn kaj gnomojn.

—Ĉu princinojn vi ankaŭ vidas? — demandis la Instruisto.

—N-ne, — respondis mi, tutforte streĉante la okulojn.

—Tie ili ne ekzistas . . . Verŝajne, ŝi estas ununura?

—Jes, ŝi estas ununura, — konfirmis la Instruisto. Li svingis la manon, kaj la elfoj, feinoj kaj gnomoj malaperis. Sed eble ili malaperis, ĉar la suno leviĝis pli alte, kaj la roso vaporiĝis.

Mi ektimis pri la Princino kaj demandis:

—Kie ŝi estas?

—Ŝi estas, kie ŝi devas esti. Kaj ŝi devas esti tie, kie ŝi ne povas ne esti, — respondis la Instruisto.

Mi sentis, ke mi tre lacas, kaj sidiĝis sur la herbon. Metr Ganzelius saltis sur mian polmon.

—Kiam al vi ŝajnis, ke vi vidas nur vin, mi rememoris la historion de reĝo Buf' la Naŭa, — diris li kaj post paŭzo daŭrigis: — Tiu reĝo regis transe trioble naŭ landoj kaj trioble dek maroj de tiu ĉi loko. La unuaj ok reĝoj Bufoj titoliĝis laŭorde — Buf' la Unua, Buf' la Dua . . . Buf' la Oka, kaj poste, kiom ajn ili estis — cent, kaj, eble, ducent — nomiĝis "Buf' la Naŭa", ĉar ili povis kalkuli nur ĝis naŭ. Tiu Buf' la Naŭa estis malica, kun malbelega vizaĝo kaj kurboflanka. Kvankam la vorton "kurboflanka" li malpermesis elparoli, anstataŭigis ĝin per la vorto "enelfleksita".

Buf' la Naŭa havis regatojn kaj korteganojn, kiel ĉiu reĝo. Ankaŭ loĝis en la regno la sorĉisto Turroputo, konata de mi kaj vi. Buf' la Naŭa havis malbonan memoron, tial ĉiujn korteganojn li ordonis nomi per unu nomo "Alfonsio". Ĉe lia kortego servis ekzekutisto — Alfonsio Kompleza kaj ĉefministro — Alfonsio Antaŭvidema.

La korteganoj pensis nur, kiel flati al la reĝo, kaj komprenis la potenculon duonvorte; tuj kiam la reĝo diris al Alfonsio Kompleza: "Estu kompleza!" — tiu jam sciis, kion fari.

La reĝo ne ŝatis multe paroli, ĉar kial paroli, se oni komprenas vin sen tio, kaj ankaŭ ĉar li singultis.

Dum festaj tagoj li eliris sur balkonon al la popolo kaj legis poemon, kiun li mem versis.

Mi regas vin saĝe!

Hik,

Kaj belegas vizaĝe!

Hik.

Foje, vokinte ĉiujn kuracistojn kaj apotekistojn de la regno, li ordonis al ili konsistigi kuracilon saniganta singultadon.

—Tia kuracilo en la mondo ne ekzistas, — ili respondis.

—Estu kompleza . . . — flustris la reĝo al Alfonsio Kompleza. Kiam la gardantaro estis forkondukanta la kuracistojn kaj apotekistojn, Buf' la Naŭa diris post ili:

—Kiu do, hik, bezonas kuracistojn kaj apotekistojn, kiuj sanigas mortmalsanajn malriĉulojn, sed ne povas helpi sian bonan reĝon, suferanta de singulto.

Post iom da tempo la reĝo vokis saĝulojn, loĝantajn en la regno, kaj ordonis al ili eldiri la plej saĝan el tio, kion ili scias.

La unua saĝulo diris, ke li ermitis en malhela kaverno, kie nenio malhelpis lin pensi, kaj, estante tie dum dudek jaroj, komprenis, ke naŭ plus unu estas dek.

— Tute ĝuste, — konfirmis la dua saĝulo; li lokiĝis en malhela kaverno ne dum dudek, sed dum kvardek jaroj. — Krome mi konceptis, ke naŭoble dek nepre estas cent.

Sed la tria saĝulo, kiu lokiĝis en malhela kaverno dum sesdek jaroj, nenion sukcesis diri, ĉar apenaŭ li malfermis la buŝon, la reĝo kolere kriis al Alfonsio Kompleza:

—Estu kompleza! Por kio mi bezonas la regatojn, sciantajn tion, kio ne estas konata eĉ de mi, ilia bona ordonulo, — diris Buf' la Naŭa, kiam la gardantaro estis forkondukanta la saĝulojn.

Ankoraŭ post iom da tempo la reĝo vokis al la kortego rapsodojn, — tiel en la malnovaj tempoj nomiĝis la poetoj.

Ĝus la unua rapsodo, griza maljunulo, sukcesis legi la unuan el siaj cent kantoj, verkitaj de li dum longa vivo honore al la popolo kaj la reĝo, kiam Buf' la Naŭa interrompis lin:

—Ĉu vi konas mian poemon: "Mi regas vin saĝe . . . Hik . . . Kaj belegas vizaĝe . . . Hik!" Sed se vi konas mian poemon, vi do devas konscii . . . hik . . . ke ĝi estas la plej perfekta, ĝusta kaj bela el ĉiuj poemoj, iam verkitaj en mia regno aŭ eblaj esti verkitaj.

La rapsodo volis ion kontraŭdiri, sed kaŝe rigardis al Alfonsio Kompleza, kiu, ridetante, ĝoje, simile al malgranda infano, ludis per akuta hakilo, kaj silente klinis sian grizan kapon.

—Se vi tion konscias, — kun jubilo ekkriis Buf' la Naŭa, — vi devas kompreni, ke ia senco estas nek en . . . hik . . . via ekzisto, rapsodo, nek en la ekzisto de aliaj rapsodoj. Estu kompleza! — finis Buf' la Naŭa, kiun tre lacigis lia parolado.

Post ankoraŭ iom da tempo la reĝo ordonis al la ĉefministro inviti al la kortego forĝistojn, arbohakistojn kaj aliajn metiajn homojn.

Sed la forĝistoj, arbohakistoj kaj aliaj metiuloj anstataŭ plenumi la ordonon de Buf' la Naŭa, konstruis floson, kargiĝis sur ĝin kune kun la edzinoj kaj infanoj kaj nokte navigis de la bordoj de la regno.

En la lasta sekundo sur la floson saltis la ĉefministro Alfonsio Antaŭvidema, aginta tiel kaŭze de sia antaŭvidemo.

Matene Alfonsio Kompleza raportis al la ordonulo, ke en la regno restis neniu viva animo, krom Lia Moŝto Buf' la Naŭa Enelfleksita, lia humila servisto Alfonsio Kompleza, kaj ankaŭ la sorĉisto Turroputo.

—Estu kompleza! — kutime murmuris Buf' la Naŭa, neniu restis por ekzekuti, kaj Alfonsio Kompleza dehakis sian propran kapon.

Ne sciante, kiel sin aranĝi sen regatoj, Buf' la Naŭa apelaciis al la sorĉisto Turroputo.

Memorfiksinte liajn konsilojn, li iris dum rosa mate-
no en herbejon kaj ekvidis sian enelfleksitan respegulon
en nekalkuleblaj rosgutoj.

Li diris magiajn vortojn, kaj el ĉiuj rosgutoj iris liaj, de
Buf' la Naŭa, nekalkuleblaj duuloj.

Ili estis tiel similaj unu al la alia, ke la reĝo perdiĝis
inter la novaj regatoj. Ĝis nun ili vagadas en la herbejo
kaj renkontiĝante demandas unu la alian:

—Ĉu vi estas Via Moŝto Buf' la Naŭa Enelfleksita? Aŭ
mi estas Nia Moŝto Buf' la Naŭa Enelfleksita? Aŭ li es-
tas Lia Moŝto Buf' la Naŭa Enelfleksita?

Ili faras nenion alian, kaj la regno malpleniĝis.

—Gardu vin de egalaj hometoj! — per tiuj vortoj metr
Ganzelius finis sian rakonton.

Kvankam mi ne tre bone komprenis — pro kio do oni
timu tiujn egalajn hometojn, se ili vagadas ie transe tri-
oble naŭ landoj laŭ nekonata regno kaj nur tedas unu al
la alia per sensencaj demandoj? — sed, certe, mi skribis
la instruon en la kajeron kaj studis parkere. Kaj baldaŭ
tio tre konvenis.

Flanke de nia domo flareblis miraklaj aromoj de fritita
viando kaj terpomoj.

Kiam ni malfermis la pordon, la Korvo kaj Kolombo
estis aranĝantaj tagmanĝon — al mi sur granda tabula
tablo, kaj al metr Ganzelius en lia ĉambro sur la table-
to el fragfolio kun piedeto — erinaca dorno.

MIA ARKANA REVO

Pasis unu jaro de tiu feliĉa nokto, kiam mi renkontiĝis kun metr Ganzelius, ekloĝis ĉe li kaj fariĝis disĉiplo de la fabelisto.

De mateno ĝis vespero ni okupiĝis pri lingvoj de birdoj, bestoj kaj koleopteroj, saltoj, naĝado, bazoj de fluga majstreco kaj aliaj fakoj, necesaj en la fabelista metio. Precipe malfacilis al mi la lingvoj de birdoj — mi ĝenerale havas malbonajn kapablojn por lingvoj, — sed, denove kaj denove ripetante la lecionojn kaj uzante senfinan paciencon de la Instruisto, mi tie ankaŭ atingis iajn sukcesojn, tiel ke mi povis matene demandi la Hirundon: "Kia estos la vetero?" kaj la Krucbekulon: "Kiaj novaĵoj sur la Luno?"

En tiu tago, antaŭ vespermanĝo metr Ganzelius diktis:

Oni ne miru, kiam oni vidas la mirindan, sed mirinde estas, se ĉirkaŭrigardinte vi vidos nenion mirindan.

Kaj plu:

Kelkaj rapsodoj kaj fabelistoj ankaŭ metas sian animon en vortojn, kiel skulptisto en marmoron, kaj forĝisto — en verajn ventoflagojn kaj hufferojn (nur tial la

veraj ventoflagoj montras vojon al feliĉo, kaj la hufferojn antaŭdiras ĝian aperon).

Aliaj majstroj, pli singardaj, entenas la animon en kalkanoj, opiniante, ke nur tie, en malhelo kaj varmo (precipe se oni surmetas dikajn lanajn dome trikitajn duonŝtrumpojn), ĝi estas en sekuro.

Kio estas pli ĝusta, ĉiu decidus mem por si, kaj neniu povas decidi tion anstataŭ alia.

La leciono finiĝis.

—Pri kio vi pensas, filĉjo? — demandis metr Ganzelius.

Mi kuraĝis diri al la Instruisto, ke certe uzi lian gastamon — estas nemeritita feliĉo. Sed ĝuste nemerito de la feliĉo angoras min, kaj mi volus en la afero kontroli miajn fortojn — ĉu mi taŭgas por io?

En mi mem mi ekpensis: "Eble survoje, en aliaj urboj, mi feliĉos almenaŭ el malproksimo vidi la Princinon?!"

Metr Ganzelius longe rigardis al miajn okuloj kaj, diveninte miajn pensojn, mallaŭte diris:

—Vi vidos ŝin! La lastan fojon, mia knabo. Mi mem volis peti vin vojaĝi. Eble la Princino helpos vin. La kompatinda knabino perdis la paciencon, atendente kvitiĝon kun la Sorĉisto. Sed, kiu scias . . . Kiu komprenos ŝian ensorĉitan koron . . .

La Instruisto en profunda pensado balancadis la kapon:

—Mi estas tre maljuna, kaj Turroputo estas certa, ke nun lin neniu malhelpos. Sed vi do ellernis multe. Kaj vi ne timos?! Matene vojen, filĉjo!

Mi dormis sentrankvile kaj tra la dormon aŭdis la leĝerajn paŝojn de la Instruisto. Li iradis de unu angulo al la alia en sia malgranda ĉambro, pensante pri io: eble pri mia sorto.

Ĉapitro tria: *La Magistro, Tondilo kaj Luno*

MI EKSCIAS, KE AMO ESTAS PLI FORTA OL TIMO

Ni ellitiĝis longe antaŭ tagiĝo kaj silente tagmanĝis. La Korvo kaj Kolombo, jam selitaj, atendis ĉe la sojlo. Metr Ganzelius lerte saltis sur la Kolombon, sed mi malrapidis, spertante damnan malkuraĝon. La Korvo, kaptinte min per beko je la zono, svingis la flugilojn kaj krute startis en la ankoraŭ nokte malhelan ĉielon.

La senceremonieco, tute ne simila al la kutima kondu-to de la Korvo, ofendis min. Al tio aldoniĝis timo; kial ne ektimi, kiam oni pendas super malpleno en beko de bir-do.

Ni malleviĝis sur arbarkameton, inter altaj pinoj. La pado, simila al diskuŝigita blueta lino kaj al amaso da nebulo, altiĝis super la tero Brustnivele.

La Korvo kun Kolombo malaperis.

Grimpinte al mian ŝultron, kaj de tie al la dekstra ore-lo, la Instruisto haste flustris:

—Gardu vin de egalaj hometoj, sed ne retiriĝu de ili. Observu Turroputon, ne perdu lin el vido! Vi vidos, kion orgojlaj homoj nomas infanaj fabeletoj, ĉar tie, en fabe-

loj, ĉio ŝajnas al ili nekomprenebla; kvazaŭ en iliaj vivoj multo kompreneblas. Kaj tial, ke tie estas feinoj kaj gnomoj; kvazaŭ inter homoj rare renkontiĝas feinoj kaj kvazaŭ ne ĉiuj homoj naskiĝas gnomoj kaj nur poste turniĝas en plenkreskajn homojn! . . . Vi vidos fabelon. Ĝi teksiĝas el plej gracila silko dum miloj da jaroj. La silka fadeno estas facile ŝirebla, distranĉebla de tondilo. Timu la tondilon, filĉjo!

Metr Ganzelius parolis ne kiel kutime, sed pelmele; ne ĉio kompreneblis en liaj vortoj.

Mi penis memorfiksi ankaŭ la nekompreneblan. Malproksime montriĝis sledo: antaŭe estis jungitaj musoj, post ili — katoj, post katoj — hundoj.

La sledo jen malaperis inter la pinoj, jen denove aperis. Tio, kion mi prenis por diskuŝigita lino aŭ nebulo, evidentiĝis veturita neĝa vojo.

La vojo tiriĝis aere, sed ne tere, ĉar tere estis somero, kaj somere neĝo ne ekzistas. ”Ĉio estas facile eksplikebla, se oni bonete pripensas”, — ŝatis ripeti la Instruisto.

La sledo rapidis kiel sago.

—La musoj timas la katojn, kaj la katoj la hundojn, tial do ili kuras tiel rapide, — diris la Instruisto.

—Sekve timo estas pli forta ol ĉio? — demandis mi.

—Ne, filĉjo. Baldaŭ vi mem scios, ke feliĉe tio ne estas vera. Ne ĉiam vera . . .

La jungitaro estis jam proksime.

—Tio estas la sledo de Turroputo, — diris la Instruisto, lerte desaltante teren. — Ensaltu ĝin! Kiam vi vidos disforkiĝon, ordonu en musa lingvo: "Dekstren!" Turroputo atendas ĉe la maldekstra vojo, ni trompos la sorĉiston.

Certe timis, sed mi ekkriis, kiel la Instruisto: "O-lala!" kaj aperis en la sledo.

La Korvo flugis iomete antaŭ la veturilo, kaj pro tio mi ne sentis solecon, kiun mi timas plej forte en la mondo.

Mi ne atentus la disforkiĝon kaj trafus en la manegojn de Turroputo, sed la Korvo laŭte grakis, la unuan kaj lastan fojon dum la longa nia konateco, kaj mi sukcesis krei: "Dekstren!"

Nun mi rememoris, ke mi veturas tien, kie mi vidos la Princinon.

Ĝus mi pensis pri tio, la sledo startis aeren, devancis la jungitaron kaj tiris ĝin post si. La musoj blekis, la katoj miaŭis, la hundoj bojis, kaj al mi estis ĝoje.

"Sekve la Instruisto pravas, kaj amo estas pli forta ol timo", — pensis mi.

La sledo denove malleviĝis sur la neĝan vojon. Sub la grinco de la patenoj min estis kaptanta duondormo.

Mi vekiĝis ial ne en la sledo, sed en malplena vagono de trajno. Vespero proksimiĝis. La radoj frapadis, lantigante la kuron. En la fenestro estis aperanta nekonata

urbo kun belaj akropintaj turoj. La pordo deruliĝis senbrue, kaj en la kupeon eniris kondukisto. Laŭ la kvieta aspekto de liaj okuloj kaj laŭ lia maniero stari, fajne klininte la etan kapeton, mi certe tuj rekonis nian Kolombon, sed ne montros al ĝi, ke la maskarado estas diveninta.

—Via haltejo! — per agrabla voĉo rukulis la Kolombokondukisto.

EN LA MISTERA URBO

En la urbo, kie mi aperis, jam estis brulantaj vesperaj fajroj. Arĝentaj kaj oraj ventoflagoj aksumis, plenigante aeron per metala grinco. Tra tiu ĉi akresona grincado mi aŭdis monotonan intersonoron de sonorigitoj:

*Donn-donn-donn —
Tiu kanto pri tio, ke
Se vi amas, la rev' plenumiĝos!
Kaj amara malĝoj' forgesiĝos.
Donn-donn-donn.*

Mi do sciis, ke ĉe mi nenio "plenumiĝos". Kaj neniam mi aŭdis de saĝaj homoj aŭ legis en libroj, ke knabino ekamis homon, se ŝi estas sepdek sesoble pli maljuna ol li!

Kaj pri kio ni parolus kun la Princino, se en la lernejo mi ricevis en lecionoj de historio nur "tri", sed ŝi mem vidis la tutan plej novan kaj novan historion kaj eĉ la mezepokon?! "Donn-donn-donn," — sonoris la sonorigitoj. Nigra ventoflago el forĝita krudfero, ne atentante

la bizaraĵojn de vento, dancanta, rondiranta, multfoje ŝanĝanta direkton, estis turnita ĉiam al la sama flanko.

La vento frapadis ĝin, kovrante ĝin per nubegoj, sed ĝi tratanĉadis la nubegojn. Rememorinte la lecionojn de la Instruisto, mi komprenis, ke tio ĝuste estas la vera ventoflago, kaj iris tien, kien ĝi montris.

La strato leviĝis krute monten. Senhoma, ĝi fariĝis pli mallarĝa kun ĉiu paŝo. Antaŭ mi aperis griza muro de unuetaĝa domo sub la tegola tegmento.

La muron kovris makuloj de humideco aŭ ombroj.

Io okazis kun tiuj ĉi bizaraj ombroj, kaj mi ekvidis ne plu senformajn makulojn, sed tri figurojn, ampleksantaj la tutan spacon de la muro de la tero ĝis la tegmento.

La mistero ŝajnis esti en ili.

La unua figuro prezentis kakeksian virinon kun grandegaj okulvitroj, tra kiuj fiksitate rigardis dornaj okuletoj de ŝtala koloro; de sub griza robo — nefleksebla, devas esti metala, — rigardis kruroj en akrapintaj ŝtalaj ŝuetoj.

Ĉio en la figuro estis akra, minaca kaj povis timigi, precipe en tiu malfrua horo kaj en la nekonata urbo, en la malplena defilejo, homon nekuraĝan.

Subite mi komprenis, ke tio tute ne estas virino, malica maljuna virgulino, sed la Tondilo: kia ĝi povas esti, se ne fera?!

Apud la Tondilo duondormis knabino kun cirkla, dorme ridetanta vizaĝo. Ŝi lumiĝis pli kaj pli forte.

Estis klare, ke kvankam ŝi dormas, ĉion ŝi vidas. Kaj kvankam ŝi estas knabino, tiel ŝi dormas kaj ĉion vidas dum milionoj da jaroj, ĉiam.

Per unu vorto, tio estis la Luno.

Iomete flanke neoportune aranĝis sin malgranda hometo — griza, en nigra jako, kun blanka antaŭtuko, surkudrita de steloj — ruĝaj, flavaj kaj bluaj. La steloj sur la antaŭtuko estis multaj, sed ne ĉiuj lokiĝis tie, kaj el dika libro, kiun li tenis aksele, de tempo al tempo elglitis steloj kaj prenis sian kutiman lokon ĉiele.

”Se ekzistas falantaj steloj, do kial miri pri steloj levantaj?” — mi pensis. La hometo en la nigra vesto gardas inter folioj de la libro stelojn, kiel mi gardis frue en dikaj libroj florojn kaj foliojn.

Li havis ankoraŭ unu strangecon: ne decelante la okulojn, li rigardis la kakeksian feran virinon. Ŝajnis, ke li vidas ne tion, kio estis pentrita, tio estas ne malican maljunan virgulinon, kaj certe ne la Tondilon, sed neordinaran belulinon — verŝajne reĝinon?! Mi kompatis lin.

Mi tuj sentis, ke tio estas sciplena, eĉ la plej sciplena homo — Magistro eble; kaj ke li — subite tio venis en mian kapon — estas delonga amiko de metr Ganzelius. Ĉiuj sciplenaj kaj noblaj homoj devas do amiki unu kun la alia?!

”La Magistro, Tondilo kaj Luno”, — mi ekpensis kaj, verŝajne, eldiris tion voĉe. Almenaŭ en la sama momen-

to la figuroj sur la muro kunverŝiĝis en senformajn makulojn, malfermiĝis pordo, kiun mi ĝis nun ne rimarkis, kaj sur la sojlo aperis la Magistro — ne pentrita, sed tute vera.

—La Magistro, Tondilo kaj Luno! — eldiris li per akra voĉo, kiu, tamen, ne timigis eĉ iomete. — Kaj kio sekvas el tio? Ĉu signifas, ke estas permesite maltrankviligi la okupatajn homojn nokte?! Precipe tute fremdajn kaj ne havantaj la honoron esti konataj kun via Moŝto kaj ne strebantaj al tiu honoro! Aĥ, vi bezonas tuj ĉirkaŭrigardi la urbon?! Aĥ, vi ne povas atendi eĉ dum unu minuto, ĉar, ne donu Dio, okazos eventoj, kiuj . . . Do kiel min tuŝas la eventoj, kiuj . . . ne donu Dio, okazos?

La Magistro diris rapide, kvazaŭ grumblante respondante ies demandojn; sed mi demandis pri nenio. Li svingis la libron, kaj el ĝi glitis la Granda Ursino.

La konstelacio trankvile leviĝis ĉielen, sed unu el la steloj restis en la grizaj haroj de la Magistro, kaj la ĉerpo de la Granda Ursino ricevis truon en la fundo. Mi atentigis la Magistron pri tiu cirkonstanco. Li duonvoĉe diris, ke li "ne povas toleri impertinentajn knabaĉojn, nepetitajn konsilulojn, kiuj ŝovas sian nazon en fremdan vazon", sed kondukis laŭ la kapo per kombilo, kaj la stelo naĝis ĉielen.

Poste li svinge frapis per la pordo kaj kuris en la defilejon.

MI REKONAS LA SORĈISTON TURROPUTO

La Magistro kuris tiel rapide, ke estis malfacile sekvi lin. Li vice starigis la malgrandajn kruretojn, kaj poste, forte puŝante sin de la tero, saltis lerte kaj malproksime, kiel lokusto. Iufoje li senmove pendis en la aero — verŝajne enpenŝiĝe, sed veke, bonorde malleviĝis teren.

Apud li flugis la Luno; ĝi frosteme vindis sin per nuboj, kiel per lanuga tuko.

Kure la Magistro diris sub sia nazo:

—La maljunulo Ganzelius ne kvietiĝis. Certe, se oni nomas la filon Silvero — arĝenta — kaj pensas, ke lia sorto ankaŭ estos arĝenta, sed li fariĝos ŝtona, tio oni tre malfacile toleras, oĥ, malfacile! Sed Turroputo! Tempas kompreni, Ganzelius, ke kun Turroputo vi ne sukcesos. Longe tempas, maljunulo!

Mi tre ĝojis, aŭdinte la nomon de la Instruisto, kaj, ne reteninte min, diris al la Magistro, ke feliĉas esti disĉiplo de metr Ganzelius.

—Kial mi bezonas scii, kies disĉiplo vi "feliĉas" esti?! — ne turnante sin, kriis la Magistro. — Kaj kiu estas tiu forĝisto Ganzelius, pri kiu mi denaske aŭdis nenion? Kiel

do, diablo prenu vin, min tuŝas liaj ŝtonaj, arĝentaj, estu ili eĉ stanaj, filoj?!

Homoj diras, ke mi estas pli simpla ol saĝa. Tamen al mi sufiĉis komprenemo por kompreni, ke se la Magistro nomis la Instruiston "forĝisto", kvankam mi ne prononcis tiun vorton, sekve li sendube konis Ganzelius tre longe.

Sed la Magistro interalie kuris pli kaj pli rapide. Iufoje li elkriis kelkajn vortojn per sia akra voĉo.

—Memorfiksu, knabo! Tio estas oficejo, kie pro akirebla prezo oni povas varbi fidindajn kurmuŝojn! En tiu apoteko, la plej malnova en la mondo, oni vendas tablojdojn de superba malpliigilo, facile kaj sendolore malpliiganta korpaltan kvincent kvindekoble!

La Luno rigardis el nuboj kaj ebligis vidi ĉiun domon.

Vento furiozis. La grincado de ventoflagoj fariĝis netolerebla, sed tra ĝi ĝoje sonoris sonoriletoj: "Donn-donn-donn!"

El streta defilejo ni kuris sur grandegan placon kaj mi tuj ekvidis la sorĉiston Turroputo.

Li facile rekoneblis laŭ la nazo, brulanta, kiel arda karbo, per bluruĝa fajro. La sorĉisto rondiris laŭ la placo kaj murmuris sub sia nazo:

Turroputo . . .

Puto . . . Turro . . .

*Por mi ĉio malfermiĝas,
La tuta mondo estas klara.
Bona — stulta! Fia — riĉa!*

Svingante bluruĝan mantelon, li levigis centojn da nordaj ventoj, pro kiuj vee ĝemis la ventoflagoj.

La malbenita sorĉisto do sukcesis ĝustatempe, malgraŭ tio, ke ni forpelis lian jungitaron.

Rimarkinte nin, Turroputo afektis alilandanon, neniofare promenanta en la urbo.

La norda vento, ĉiuj nordaj ventoj samtempe obtuzis. Kaj la grinco de la ventoflagoj ĉesis.

Bedaŭrinde la Magistro, sinkinta en siajn pensojn, ne rigardis Turroputon, kaj mi ne kuraĝis tedi lin.

Tie, kie la defilejo eliris en la placon, al la ĉielo leviĝis la plej alta turo en la urbo, ĉirkaŭvolvita de hedero de la subo ĝis la pinto; kontraŭe videblis malnova trietaĝa domo; ĉe la bordo de la tegmento staris ŝtona figuro de Junulo kun krispaj haroj, laŭ malnova modo falantaj sur la ŝultrojn, brile iluminita de la luno.

La Junulo estis altkreska, de proda kompleksio, ŝajnis esti homo bona, kuraĝa kaj fidinda. Li sendube estus belulo, se ne angora kaj moka grimaco, distordus lian vizaĝon. La malhela preĝanta rigardo de la Junulo estis senmove celita al la sola fenestro de la turo, oscilanta en la luna lumo en vertiĝa alto.

—Kompatinda Silvero, — softe, al si mem parolis la Magistro, rigardante al la Ŝtona Junulo, kaj balancante la kapon. — Ĉi vi ankoraŭ kredas, ke la Princino denove vin amos?

Mi komprenis Silveron. Kaj certe mi amis lin; kiel mi ne amus la filon de la Instruisto. Sed kiel nebone estas aranĝita la homa animo, ĉiuokaze mia animo — mi do ĝojis pro tio, ke la Princino ne plu amas la Junulon.

La Magistro jen kuris, ofte interstarigante la kruretojn, jen saltis kiel lokusto, sur la ŝtonigita placo; senmove li pendis en la aero kaj denove saltis ankoraŭ pli rapide. Mi apenaŭ sukcesis sekvi lin.

Malantaŭe kaŝe moviĝis Turroputo.

Ni preterpasis aleon de kaŝtanarboj kaj aperis antaŭ la urbodomo, tre malnova konstruaĵo, sur kiu tegoloj nigriĝis de la tempo. Sekve, jen de kie alportiĝas la nesilenta "donn-donn-donn": la horloĝo sur la turo de la urbodomo kun la blua ciferplato kaj la signoj de la zodiako elsonoris sekundojn.

La Magistro rigardis al mi kaj kaŝe prenis de sia brusto pezan arĝentan ŝlosilon, grandan kiel karboŝovilo.

Tio estas, al li ŝajnis, ke li faras tion kaŝe, sed mi bone vidis la ŝlosilon kun la incizita kapeto, figuranta kantantan kokon.

Kaj Turroputo, kiu ankoraŭ ĝis nun afektis la alilandanon, laŭte eksklamaĉante, kvazaŭ pro ekstazo antaŭ la

olda beleco de la urbo, certe ankaŭ vidis ĉion, kion li bezonis.

Kion fari, iufoje okazas, ke saĝa, la plej saĝa homo, eĉ la Magistro, eraras, kiam li renkontas plenan kanajlon. "La alto timas la malalton, kaj la saĝo timas la kovardon, kiel la elefanto timas la muson," — ofte memorigis la kara Instruisto.

La magistro suprenkuris laŭ ŝtuparo, ĉirkaŭvolvanta la turon de la urbodomo, al ties pinto, kaj kuraĝe saltis sur la stelon, kiu pendis ĝuste antaŭ la ciferplato de la horloĝo. Aranĝinte sin sur la stelo, kiel sur eskalo, li el-tiris la ŝlosilon kaj komencis streĉi la horloĝon.

Dum tio li balbutis al si sub la nazo, sed sufiĉe laŭte tiel, ke povis aŭdi lin kaj mi kaj la sorĉisto.

—Dudek turnoj de maldekstre dekstren, kiel iras la horloĝo, kiel fluas la tempo de nokto al mateno. Sed se oni turnas la ŝlosilon dekfoje de dekstre maldekstren, kiel iras vivo en morton, tago en nokton, o, tiam . . . Li ne finparolis.

*Donn-donn-donn —
Tiu kanto pri tio, ke
Se vi amas, la rev' plenumiĝos!
Kaj nigra malĝoj' forgesiĝos.
Donn-donn-donn.*

La horloĝo sonorigis la facilan, sed ĉarman kanteton.

”Se ne ĉe mi pleniĝos, jen ĉe alia, ĉe Silvero, la Ŝtona Junulo, kiu dum okcent jaroj atendas sian fianĉinon,” — mi pensis kaj firme decidis helpi lin, se mi nur povos, se eĉ min minacos timindaj danĝeroj; pli bone ne tre timindaj, alie povas ne sufiĉi decidemo . . .

La Magistro estis rekurinta de la urboturo al tiu alta turo. Kurante li neatente ĵetis al mi:

—Estu sana, knabo!

En la sama sekundo nigraj nubegoj kovris la lunon kaj stelojn. Enregiĝis mallumego. En tiu mallumego mi ekvidis, kiel la ruĝaj lumantaj ŝuoj de la Magistro glitis de la tero al la pinto de la turo.

En la fenestro de la turo bruliĝis lumo.

Kiam la luno denove elrigardis, Turroputo, ne kaŝante sin plu, komencis danci ĉirkaŭ mi sovaĝan dancon, svingante la mantelon, de kio denove leviĝis nordaj ventoj kaj la urbaj ventoflagoj, — ĉiuj escepte de unu, — ekhoj-lis kaj grincis, kantis milvoĉe.

—Denove kun la nazo! Kun la nazo!! Kun la nazo!!! — dancante, elkriadis Turroputo. — La stultulo Ganzelius tute freneziĝis, se li prenis tian helpiston, kiel tiu stulta knabaĉo. La fileto Silvero restos ŝtona, ĉar tiel decidis mi, la plej granda kaj malica el ĉiuj plej grandaj kaj malicaj sorĉistoj!

Turroputo kaptis la hederon, ĉirkaŭvolvantan la turon, kaj komencis rapide grimpi laŭ la vertikala muro.

Mi fermis la okulojn kaj, malgraŭ tio, ke mi sentis senesperan kapturniĝon kaj la ke la koro fadadis, ankaŭ mi grimpis supren laŭ la muro. La hedero ŝiriĝis, kaj mi falis kiel sako, dolorege frapiĝinte sur la pavimo.

—Kalkulu, kiom da ripoj, brakoj kaj kruroj vi rompjis, stultulo, — kriis la Sorĉisto. — Dum ne malfruas, reiru al la oldulaĉo Ganzelius.

Turroputo fariĝis plata kiel ludkarto, kaj glitis en fendon de la fenestro.

”Certe, malfacile estas esti disĉiplo de fabelisto. Sed mi neniam, neniam lasos vin, kara Instruisto, se mi eĉ estas juĝita por vivi nelonge kaj neniu havas de mi ian utilon”, — pensis mi, pene leviĝante de la tero.

Mi ĉirkaŭiris la turon, esperante trovi eniron, sed pordo ne ekzistis.

”Kion fari?” — angore mi demandis min mem. — Se Turroputo estas en la turo, mi nepre devas esti tie: la Instruisto ordonis eĉ por sekundo ne lasi la sorĉiston el la vido.

Subite mi rememoris, kiel ni kun la Magistro iris laŭ la defilejo. Mi rememoris la apotekon, kie oni vendas la malpliigilon, malpliiganta korpaltan kvincent kvindekoble, kaj Oficejon por varbado de kurmuŝoj. Mi ankoraŭ ekpensis, aŭdante la Magistron: ”Por kio do oni bezonu kurmuŝon.”

—Ni rekontiĝos kun vi, kovarda Turroputo! Gardu vin! — mi flustris, kvankam mi komprenis, ke mi devas gardi min, ne la sorĉisto.

Donn-donn-donn, — elsonoradis la horloĝo.

Donn-donn-donn —

Se vi revas, la rev' plenumiĝos,

Se ne timas, la rev' plenumiĝos,

Kaj nigra malĝoj' forgesiĝos!

Donn-donn-donn.

MI KONATIĜAS KUN AĤUMDUS AĤUM

Mi sukcesis ne perdi la vojon en stretaj defilejoj de la Malnova urbo, sed, iufoje rigardante al la ventoflago, eliris ĝuste al la Apoteko. Maljunulo-provizoro, bonulo, tuj donis al mi la tablojdon de malpliigo.

—Ordinare ni vendas, khe, khe, tiun ĉi rimedon nur laŭ recepto, sed laŭ via vizaĝo oni vidas, ke vi, knabo, estas facila animo, kaj ne elpensos, kiel uzi ĝin por malbono.

Jen kiam taŭgis la panja kupra groŝo. Ĝuste sur la butiktablo ĝi transformiĝis en oran moneron, kaj la provizoro donis al mi krom la malpliigilo ankoraŭ kvin arĝentajn monerojn de la restaĵo.

Mi estis sur la sojlo, kiam li vokis min.

—Ĉu vi ne rezervos, juna homo, khe, khe, pliigilon? Povas enuigi ĉiam esti kvincent kvindekoble malpli alta ol la ordinaraj homoj.

Kio okazus kun mi, se ne estus la provizoro! Certe, la Instruisto estas Pizulo. Sed kiom da saĝo li havas! Sed kiel esti pizergranda, se vi scias ne pli multe ol la pizerero en verda guŝo.

En Oficejo por varbado de kurmuŝoj mi antaŭpagis difinitan pagon por diurno kaj ricevis metalan skatolon, simila al dometo. Sur la pordeto estis albatita la tabelo: "Aĥumduŝ Aĥum. Sen afero ne tedu."

Mi ridetis al la severa averto kaj kaporompe rapidis al la gastejo.

Malforta, sed tre komprenebla kaj altrudiĝema zumado haltigis min. La Instruisto instruis al mi dialektojn de majaj skaraboj kaj burdoj, tial mi de la unuaj minutoj bone komprenis Aĥumduŝ Aĥum, ankaŭ rilatantan al la "zumantoj".

—Hej, amiĉjo, vi ne estas dekjara por salti dum irado, kiel pulo, kaj balanciĝi kiel kamelo. Sciuj, ke al bonrasa estaĵo skuo malutilas.

Mi ĝuste enfostiĝis. Estu mi homo ne fera, kaj pro kio mi povas fieri, sed kiam ordinara muŝo nomas vin pulo kaj kamelo, tio al multaj ne plaĉos.

Oni bezonis, oni tuj bezonis starigi Aĥumduŝ Aĥum sur ĝian placon, sed mi ne elpensis kiel, ĉar mi pensas malrapide.

En la gasteja ĉambro mi kuŝigis sur la tablon la dome-ton kun Aĥumduŝ, la blujajn tablojdon de la malpliigilo kaj tiu de la pliigilo.

"Jen nun mi fariĝos kiel fazeolero," — mi pensis, ek-tremante kvazaŭ de malvarmo.

Bildo de la Instruisto, emerginta en la memoro, helpis min venki la heziton.

”Estu, kio estos,” — mi diris al mi mem kaj jam portis bluan tablojdon al la buŝo, kiam denove aŭdiĝis la unusona zumado de Aĥumtus; ĝi lerte malfermis la pordeton de sia dometo kaj staris sur la sojlo:

—Atendu, amiĉjo! Antaŭ ĉio, laŭ la kondiĉoj de la varbo, vi devas nutri min.

Mi prenis el la poŝo pinĉaĵon da paneroj, sekaj pro longa kuŝado kaj ĵetis ĝin al Aĥumtus, sed tiu malesteme balancetis per la kapo:

—Ne, karulo! Forigu tion, mi ne toleras malpuron . . . Jen tiel . . . Kaj nun akiru guton da sukera siropo, maldensigita, certe, en varmeta akvo; leĝera manĝo utilos al delikata bonrasa estaĵo.

Mi havas cedeman karakteron, sed nun en mi ĉio bolis. Mi devis kuri malsupren, en restoracion, por akiri varmegan akvon kaj pisti sukeron.

Aĥumtus vespermanĝis netolereble malrapide; post ĉiu gluto aŭdeblis ĝia unusona zumado:

—Verkistoj laŭdegas la birdojn kaj nigrigas nin, escepte de la inspirita bildo de Muĥa-Cokotuĥa³. Sed fakte, — kaj vi pri tio baldaŭ konsentos, — ne ekzistas io pli raba kaj danĝera ol birdo. En la mondo ĉio relativas, amiĉjo.

3 Muŝo-Zumulino, persono de versa infana fabelo de K. Ĉukovskij, konata en Rusio.

Mi duonsidis sur la tablorando, tenante en la dekstra mano la malpliigilon, kaj en la maldekstra glason da akvo por posttrinki la tablojdon.

—Bone, — zumis Aĥumduŝ, lavante la piedojn. Mi pretas kaj atendas. Antaŭ ol vi glutos la malpliigilon, penu adopti la jenan . . .

—Gardu ĉe vi la muŝan saĝaĉon, — interrompis mi. Mi ne povis plu toleri kaj eksplodis, al kio kontribuis la angoraj pensoj pri antaŭstarantaj malfacilaĵoj.

—Kiel vi volas, kiel vi volas, — respondis Aĥumduŝ, premante la flugiletojn kaj turnante sin al mi per la dorso.

Mi glutis la tablojdon, sentis netolereblan kapturton kaj por kelkaj sekundoj perdis konscion. Kiam mi rekonsciigis, sub mi ampleksis profundegaĵo sen fundo. Baldaŭ, tamen, mi komprenis, ke mi kiel antaŭe sidas sur la tablorando, sed malpliigis tiel, ke la distanco ĝis la planko — malpli ol unu metro — kreskis por mi ĝis alto de centkvindeka domo!

—”Falu, kaj eĉ la humida loko ne restos,” — en teruro mi pensis, leviĝante sur la piedojn kaj kankre moviĝante de la tablorando. ”Ne gravas, ne gravas. Tio estas por nelonge. La ĉarma olduleto provizoro zorgis pri vi, kaj vi en iu ajn sekundo povas estiĝi tia, kia vi estis”, — mi murmuris, turnante min kaj serĉante per la okuloj la ruĝan tablojdon de la pliigilo.

Kaj nun min afekciis la terura penso.

Mi kuris al la ruĝa tablojdo, kun grandega peno, ŝvitante, turnigis ĝin sur la randon. Ĝi atingis mian ŝultron. Larmoj senesperaj, ne moligantaj la malĝojon, fluis el la okuloj.

—Kvietiĝu, — zumis en tiu malĝojega sekundo Aĥum-dus. — Certe, se vi antaŭvideme dispistus la tablojdon de la pliigilo, — tion do mi volis konsili, kiam vi tiel krude min silentigis . . . Sed, je via feliĉo, Aĥum-dus ankoraŭ ekzistas; deĵetu la pereigantan neobeon . . . kaj mi do elpensos ion.

Mi komencis varmege aserti al Aĥum-dus, ke mi tute fidas ĝian saĝecon.

—Bone, bone! — grumblante interrompis ĝi. — Do sidiĝu sur min, kaj ni flugos. Vi ne estas en infanĝardeno, tempas labori . . .

Mi surseliĝis, per ambaŭ manoj kaptinte la selkapon. Aĥum-dus krute startis supren, kaj tra malfermita vazistaso ni elflugis en la urbon.

AĤUMDUS KLERIGAS LA RACION

Dum la unuaj minutoj de la flugo min naŭzis, kaj mi povis pensi pri nenio, nur penis ne rigardi malsupren, kie brulis fajroj de la nokta urbo kaj kvazaŭ grizaj arboj sen branĉoj leviĝis turoj al la ĉielo.

Poste mi ĉirkaŭrigardis.

Ni flugis ne al la placo, sed al tute alia flanko. Mi nekuraĝe demandis, kial ĝi estas elektinta tiun ĉirkaŭvojon. Aĥumtus respondis per severa edifo.

—Vi scias, amiĉjo, muŝoj simile al homoj ne naskiĝas tiaj kleraj, kia mi estis dum nia renkontiĝo. Verŝajne, en la juneco mi estis ne pli saĝa ol vi. Sed mi uzas ĉiun okazon, por per vojaĝoj kaj rigardado de la ĉirkaŭaĵo klerigi la racion.

Post longa flugado ni flugis en fenestron de kuirejo, kie malgraŭ la malfrua horo hejtiĝis bakforno kaj bolis kuvo kun ĉeriza konfitaĵo.

—La bonulino Katrin ne pardonus, se mi rifuzus gustumi ŝian kuirajon. Oni devas ĝojigi la proksimajn, — zumis Aĥumtus.

Katrin, malgranda, dika maljunulino, iom bizare demonstris la ĝojon. Ŝi kaptis longan viŝilon kaj, turnante ĝin en aero, kriis:

—Kŝ, malbenita, eĉ nokte ne ekzistas ripozo.

Ni kun Aĥumtus feliĉe eskapis la danĝeron. Aranĝinte sin sur la plafono kaj rigardante al la folioj de bruna glua papero "morto al la muŝoj", kuŝigitajn sur tablo kaj fenestrobreto, Aĥumtus diris:

—Diabla inventaĵo. Mi pensas, ke se sur la tero laŭ justo reĝus la muŝoj kaj mi estus la Ĉefa Muŝo, mi neniam permesus fari tiajn kaptilojn por homoj. Kvankam, kiu scias, — pensoplene zumis ĝi post minuto, — la malkreskuloj ploras, kiam ilin ofendas la kreskuloj, sed estiĝante kreskuloj, mem ofendas la malkreskulojn. Ĉio relativas; vi, simplulo, tion ne komprenos.

Aĥumtus akiris antipatian manieron nomi min simplulo kaj eĉ — stultuleto. Sed kion oni faros, se mia estonteco dependis de ĝi? Kaj ekzistas alinomoj pli malbonaj. Tuj mi ne povas rememori, sed certe multaj alinomoj estas multe pli ofendaj.

Do ne gustuminte ĉerizan konfitaĵon, ni flugis el la kuirejo.

Kiam ni estis super la placo, Aĥumtus decidis viziti la urbodomon.

—Vi konatiĝos kun artaĵoj, atentindaj kaj ne por tiu simplulo!

En duonmalhelo de la urbodomo mi vidis, etendinta laŭ la muro laŭ ĝia tuta longo, pentraĵon. En ĝi estis bildita Bufo la Naŭa Enelfleksita, kiun mi tuj ekkonis, rememorinte la rakonton de la Instruisto, apud li Alfonsio Kompleza kun francisko — verŝajne, filo de tiu Alfonsio Kompleza, kiu mem sin ekzekutis, Alfonsio Antaŭvide-ma kaj plu longa vico de figuroj. Malantaŭ ĉiu staris la morto kun falĉilo.

Ni flugis laŭlonge de la pentraĵo; subite en stela lumo mi vidis la Princinon. Al ŝi el la profundo de la pentraĵo kaŝe proksimiĝis la morto. Tio afekciis min tiel, ke mi ekkriis. Ke mortemaj estas ĉiuj tiuj Bufoj kaj Alfonsioj — tio tre bonas. Kaj mi estas mortema; do kio, nenio fari. Sed la Princino! Ŝi vivu eterne! Ie malproksime, sed ŝi tamen vivu.

Mi enpenŝiĝis kaj preskaŭ ne rimarkis, ke ni flugis el la urbodomo, transis la placon kaj tra la malfermita fenestro penetris la turon.

Komenciĝis la ĉefaĵo.

LA PRINCINO RENKONTIĜAS KUN LA ŜTONA JUNULO

La Magistro sidis ĉe la tablo, movita al la volba fenestro. Antaŭ li kuŝis malnova leda monujo kaj areto de moneroj. La Tondilo apogis sin al la muro. Metinte la monerojn en la monujon, la Magistro levis la okulojn, plenaj de tia amo, ke ĝi povus degeligi eĉ feran koron.

—Kiom vi kalkulis? — klakvoĉe demandis la Tondilo.

—Tri orajn, naŭ arĝentajn kaj kvardek sep kuprajn, — kulpe respondis la Magistro.

—Tiom do vi akumulis dum la longa vivo?!

—Sed mi ankoraŭ havas vin, bela Tondilo, do vi ne kostas ĉiujn riĉaĵojn de la mondo?! — diris la Magistro.

—Enamiĝintaj muŝoj almenaŭ ne blindiĝas kaj ĉiam diferencigos muŝfunĝon de ĵaro da konfitaĵo, — juste rimarkis Aĥumdus. Ĝi aranĝis sin sur la plafono, kaj mi pendis kapmalsupren: kun tiaj neoportunaĵoj oni devas humili, se oni uzas muŝon kiel kurbeston.

—Absurde! — klakis la Tondilo. — Ĝis vi ne akumulos milon da oraj, ne arogu eĉ rigardi miaflanken. O, mi nefeliĉa. Aliaj, veraj majstroj, faras verajn aĵojn el vera metalo — franciskojn, hakilojn, lancojn. Kaj vendas por

vera oro. Sed vi . . . Ĉiuj figuretoj, kiujn vi nokte mod-
las el la luna lumo, viviĝas kaj forflugas.

—Ili revenos, — malkuraĝe kontraŭdiris la Magistro.
— Antaŭ la sunsubiro, kiam la nokto proksimiĝas, tiuj
kreitaj de mi al mi revenas.

—Foriru en vian kameron. Mi ne volas vin vidi! —
ordonis la Tondilo.

Kiam la Magistro eliris, la Tondilo tuj iris al la fenest-
ro kaj, kondukante la pupilojn sub la suprajn palpe-
brojn — tio estas mode ĉe la versplektuloj, — klakis:

Junuloj — batalanto, matroso, poeto!

Aŭskultu la vortojn de mia dekreto:

Nur fero amendas,

Kun fero la sort' dividendas.

Eternan malvarmon havanta,

Torenton de l' viv' haltiganta,

Estas ĝi.

”Malagrangeaj versaĉoj”, — ekpensis mi. — Br-r!”

Dume Turroputo eliris el la fendo, kie li kaŝiĝis, eten-
dis la mantelon, kiel pavo etendas la voston, leviĝis sur
la piedpintoj, kaj kiam la Tondilo eksilentis, tuj hojlis,
kvazaŭ ŝakalo al la luno.

—O plej bela, saĝa kaj mirakla! Donacu minuton da
atento al fremdlandano, kiu survoje al vi venkis miloj da
ŝtormoj kaj batalis kontraŭ legioj da monstroj. Mi ĉir-

kaŭveturis la tutan mondon, kaj ĉie, en landoj, multeloĝigitaj kaj senhomaj, popoloj, donacitaj de la genio de versarto kaj senvoĉaj pro sia sovaĝeco, loĝantoj de duoninsuloj, insuloj kaj arĥipelagoj kantis himnojn honore al vi, o Tondilo!

Kia senhontema absurdaĵo! Sed se vi nur vidus, kio fariĝis kun la Tondilo dum Turroputo hojlis. La brusto de ĝi pasie leviĝadis, sur la vangoj ruĝkoloro elpaŝis freŝa rusto, la pikantaj okuletoj briladis.

—Aĥ, kion vi diras, — afekte ĝi klakis. — Certe mi scias, kiel iuj ŝatas min. Min do ne tuŝas la Magistro, almoza oldulaĉo, eĉ tiu Junulo — la ŝtona kaj, mi arogas diri, el bona familio, ne kondukas de mi la rigardon . . . Sed tamen, kvankam mi estas dorlotita pro atento, tio, kion vi diras pri la insuloj, duoninsuloj kaj arĥipelagoj, — se tio estas vera, mi do ne toleras flaton . . .

—Nur milono de la vero, o nekomparenebla! Milionon da buŝaj onidiroj disportiĝis tra la mondo, ke vi, de beleco plia ol Afrodita, kaj de saĝeco de Zeŭso, ankoraŭ pli alta ol ĉiuj en la subluna mondo leviĝis en la dia arto de tranĉado el papero. Prenu, nekomparenebla, tiun ĉi folion kaj blindigu fremdlandanon per via arto.

—Papero estas magia . . . La Magistro ne permesas tuŝi ĝin, — jam koncedante kontraŭdiris la Tondilo.

—La placo de magio estas en la magiaj fingretoj. Mi arogos konsili faldi la paperon duoble. Plu! Plu!! Plu!!! Nun tranĉu.

Kelkaj dekoj da paperaj figuretoj glitis el la manoj de la Tondilo kaj, falinte sur la plankon, viviĝis.

—La egalaj hometoj! — softe aĥis Aĥumtus. Ĝi tute tremis. La unuan fojon mi vidis Aĥumtus timigita. Verŝajne ĝi jam puŝiĝis kun la egalaj hometoj. Mi ankaŭ sentis angoron, mi ja memoris la rakonton de la Instruisto pri la Regno de Buf la Naŭa, kaj la vortoj de li: "Timu la egalajn hometojn!"

La Tondilo ŝatis la laboron; la figuretoj deke kaj cente faladis sur la plankon. Viviĝinte, ili viciĝadis kolumne kaj komencadis marŝi.

—Unu . . . Du . . . Unu . . . Du, — ekdancante kaj ridaĉante, komandis Turroputo.

De ie ĉe la hometoj aperis pikoj kaj tamburoj.

—Mi ne povas, — diris Aĥumtus, flugante en magistran kameron.

La Magistro, kiel li estis vestita, dormis sur la streta fera lito.

Apud li sur tabureto kuŝis la monujo. Laŭ la muroj rampis oniskoj, striete fluis akvo; la kamereto similis al kamero de prizono.

Sed ĉi tie ne ekzistis la egalaj hometoj kaj malica Tondilo, kaj ĉi tie oni spiris pli facile . . .

—Ni ripozu, — zumis Aĥumduŝ, aranĝante sin sur la plafono kaj fermante la okulojn.

Tra la pordon enkuris Turroputo. Ŝtele ĉirkaŭrigardinte, li klinis sin super la Magistro, tuj rektiĝis kaj malaperis.

Mi pensis, ke Turroputo ŝtelis ĉe la Magistro liaj veaj groŝoj, sed la monujo kiel antaŭe kuŝis sur la tabureto, kaj mi kvietiĝis.

—Ne, ne, — angore zumis Aĥumduŝ. — Ion fian li faris.

La Magistro en dormo spiris egalmezure kaj kviete. Ni denove flugis en la unuan ĉambron. Turroputo staris sur la fenestrobreto. Svinginte la mantelon, li diris:

—Mi foriras, dia, por verki en silento honore al vi genian poemon, dum la frido de via amo plenigas mian koron. En la Glacia Mondo estos feliĉaj nur ni ambaŭ — vi, Tondilo, kaj mi!

Jen, signife, kiel malproksime iris la afero! Kaj kia "Glacia Mondo"?! Turroputo komencis rapide malsupreniri, elklariĝis, ke sub la hedero en muro de la turo ekzistas fera ŝtuparo.

—Ni flugu, — en afekcio zumis Aĥumduŝ.

En la pordo aperis la Magistro. Li iris, duonferminte la okulojn kaj etendinte antaŭen la manojn, kvazaŭ en sonĝo. Lia vizaĝo estis tre pala.

Ĉiuj kandeloj samtempe estingiĝis, kvazaŭ de blovego, sed mi ne sentis venton.

En la ĉambron penetris la fosto de neordinare brila lumo de la luno!

Aŭdeblis intersonoro de la urba horloĝo:

Donn-donn-donn —

Tiu kanto pri tio, ke:

Ne poltronu, kaj rev' plenumiĝos!

Se vi amos, la rev' plenumiĝos!

Kaj nigra malĝoj' forgesiĝos.

La Magistro kondukis per la manoj laŭ la luna radio, kvazaŭ ion modlis el ĝi. En la radio aperis — mi ne scias, kiel diri alimaniere — la Princino. Neniam ŝi estis tiel bela, kiel en tiu momento.

Aĥumtus softete aĥis, kaj ĉe mi la okuloj pleniĝis de larmoj.

—Bonan tagon, patro! — diris la Princino.

—Bonan tagon, knabino! — karese respondis la Magistro. La steloj diras, ke en ĉi tiu nokto finiĝos la ekzorco, per kiu Turroputo envultis vin. Estu tiel! Estu via koro denove amema kaj kompatema. Ĉu ĝi reviviĝos, via kompatinda koro?

La Princino silentis. Nur malĝoja rideto eklumis en ŝiaj blujaj okuloj.

—Vi devas renkontiĝi kun Silvero, — daŭrigis la Magistro. — Hodiaŭ ĉio decidiĝos!

—Se vi ordonas, patro, mi iros.

Ŝi malaperis malantaŭ la fenestro. La Ŝtona Junulo — tio estas, verŝajne, en tiu momento li estis ne tute ŝtona — nepacience paŝis al la bordo de la tegmento.

”Li do nenion vidas kaj aŭdas. Nun li falos kaj disrompiĝos”, — mi pensis kaj, rememorinte pri mia magia laĉo, plenforte disvingis ĝin kaj ĵetis ĝin trans la strato.

La Junulo, liginte la laĉon al la gargojlo, malleviĝis sur la placon.

La laĉo volviĝis globe, retraflugis al mi kaj, kvazaŭ nenio okazus, eniĝis en la kunligaĵon.

Starante ĉe fenestro de la turo, la Magistro akompanis per rigardo la Princinon kaj Junulon, forantaj sur la placo iluminita de la luna lumo.

Aŭdeblis malica klako de la Tondilo, pri kiu mi preskaŭ tute forgesis:

—La kanajlo rigardis ŝin, sed ne min, tiu junulaĉo, nur afektinta ŝtona. ”La bela Princino . . .” La mondo freneziĝis de beleco. Se mi povus, mi eltranĉus la emon al beleco jam en bebeco, kiel oni forigas la adenoidojn. Tiam regnus mi, Tondilo, kaj la malsaĝaj Princinoj havus nenion por fari en la mondo . . . Negrave, min amas la riĉa kaj nobla fremdlandano. Kaj se . . . Finfine taŭgos la oldulaĉo Magistro . . .

La Tondilo parolis softe, preskaŭ flustre. Tamen por ni kun Aĥumtus ĉio do estis aŭdebla! Kial do la kompatinda Magistro nenion aŭdis?

—La enamiĝintaj muŝoj almenaŭ ne surdas, — enpensante zumis Aĥumtus.

—Ŝajnas al mi, ke tio estos timinda, sed, verŝajne, la plej feliĉa nokto, — diris la Magistro.

LA HORLOĜO IRAS INVERSE

Ni flugis el la turo.
 —Je Turroputo! — entuziasme zumis Aĥumtus.
 Ni atingu la Sorĉiston kaj forigu lin, alie li ekzistigos
 tian . . .

—Kiel ni lin forigos? — malkuraĝe demandis mi.

—Mi jam elpensos, Simplulo! KREDU al Aĥumtus!

En la hela nokto blovetis malvarmego. Nigra ombro
 kuŝiĝis sur la placon. "Don", — la lastan fojon sonoris la
 horloĝo, kaj aŭdiĝis tute aliaj sonoj, kvazaŭ iu per tranĉi-
 lo skrapus laŭ vitro. "Tĵarĉ-tĵarĉ-tĵarĉ", — raŭkis la hor-
 loĝo.

Inverse al fremda kaj surda jarcent' . . .

La blinda, la muta.

Al lando de nokto, malvarmo kaj vent'.

Al ver' krucimita, reganta malver';

Al leĝoj sangitaj, skribitaj de fer';

Al kant', kiun pelas kronita punist'.

. . . La blinda, la muta jarcent'.

Tĵarĉ . . . Tĵarĉ . . . Tĵarĉ . . .

La horloĝo ripetadis kaj ripetadis la timindajn liniojn.

—Kion tio signifas? — timigite demandis Aĥumdus.

—Mi ne scias . . . Eble al la horloĝo ŝajnas, kvazaŭ revenas la mezepoko?! — respondis mi.

—La mez-epoko?! Hm! — zumis Aĥumdus en sia kurtima instrua tono. — Ne plu tiel malbone. La "meza", certe, estas malpli bona ol la "bona", sed pli bona ol la "malbona". Oni ne bezonas esti muŝo por elpensi tion.

—Ne . . . Ne! — diris mi, penante rememori ĉion, kion mi lernis en la lernejo pri la terura mezepoko. — Tiam estis tiaj ekzekutistoj — inkvizistoj. Ili bruligadis sciencistojn, ĉar ili rigardis al la steloj. Ili bruligadis knabinojn, ĉar ili estis belaj kaj ĝojaj, pli amis danci ol aŭskulti homiliojn. Kaj ili bruligadis bonajn homojn, kiuj skribis librojn, mokantajn kaj damnantajn la ekzekutistojn.

—Strangaj estaĵoj estas homoj, — zumis Aĥumdus. — Ne, muŝoj ne bruligas muŝojn . . .

En la fenestro aperis la Magistro.

—Katastrofo! — li ekkriis. La ŝlosilo estas ŝtelita! La horloĝo ekiris inverse. Ĉu denove Turroputo?!

Aŭdinte la vortojn de la Magistro, Aĥumdus krute ĝiris, kaj ni denove flugis al la turo.

—Kiu estis ĉi tie, dum mi dormis? Mi petegas vin, Tondilo, diru la veron! — demandis la Magistro, paŝinte internen de la ĉambro.

—Neniu, Magistroĉjo! — per klakanta mensoga voĉo respondis la Tondilo. — Mi ne foriris de vi eĉ unu paŝon, ĉiam depelis tedantaj kaj malsaĝajn muŝojn.

—La kovarda Tondilo! — indigninte zumis Aĥumodus. — Sed mi ankoraŭ kvitos kun vi.

Post paŭzo la Magistro laŭte diris:

—Mi kredas al vi. Oni ne povas perfidi homon, se li tiom vin amas . . .

Kompatinda Magistro, mi ankaŭ kredas al homoj. Sed kio mi estas? ”Simplulo”, — kiel esprimas sin Aĥumodus. Sed la plej sciplena homo devus scii, al kiu kredi kaj al kiu ne. Alie por kio taŭgas tuta lia dokteco?

Ĉapitro kvara: *La urbo de egalaj hometoj*

GLACIA PRIZONO

Ni flugis super la placo, de la turo al la urbodomo. Sub la flugilo de Aĥumtus montriĝis stranga urbo. Kiel ĝi aperis en la dezerta ŝtona placo, tie, kie ĵus ne estis eĉ unu konstruaĵo? En griza malvarma lumo etendiĝis rektaj stratoj. Laŭ ili, inter kvadrataj domoj, marŝis, ne fleksante la genuojn, la egalaj hometoj en gri-zaj uniformoj, kun tamburoj kaj lancoj.

Tra bruego de la tamburoj aŭdiĝis ŝakala hojlado:

*Al pensoj plataj estu ema,
Pens' plata estas praktikema!*

Jen kie li, nia malamiko Turroputo!

Aĥumtus komencis krute malsupreniĝi, preta surteriĝi, sed ne tuŝis la teron, kaj vibrigante la flugilojn, senmove pendis en la aero.

—Kio okazis al vi? — demandis mi.

—Mi ne povas! — per tremanta voĉo devokiĝis Aĥumtus. — Tie estas "Morto al la muŝoj"!

Al ĝi ŝajnis, ke la stratoj estas pavimitaj de la glua papero.

Mi provis discerni ĝin pri tio, sed ĝi nur neante skudis la kapon.

—Faru, kion vi volas, mi saltos mem, — elŝiriĝis ĉe mi.

Mi saltis, ankoraŭ en la aero bedaŭrante tiun mian frenezaĵon.

Mi falis sur ŝtonan pavimon, pene leviĝis kaj, lamentante, iris laŭ unu el la stratoj.

De ĉie aŭdiĝis la komandoj: "Unu-du!", "Eg-galu!"

Mi renkontiĝis kun du egalaj hometoj.

—Kiel nomiĝas via urbo? — mi demandis.

Respondante, ili parolis laŭvice per egalaj voĉoj:

—Tio estas la fama "Urbo de egalaj hometoj!"

—La de ĉiuj konata!

—Ĉe ni ĉio egalas — kaj la homoj, kaj la domoj.

—Kaj tio bonegas. Se do ĉio ne egalus, aperus diferencoj.

—Kaj diversaj hometoj bezonus diversajn uniformojn.

—Kaj diverskoloraj domoj — diversajn farbojn.

—Kaj diversaj pensoj — diversajn kapojn.

Denove alportiĝis hojlado de Turroputo:

Rigardu nur sonĝojn rekomenditajn,

Boligitajn kaj enpakitajn.

La sonĝoj, per si mem naskitaj,

Por rigardo estas prohibitaj!

Mi kuris al la voĉo de la Sorĉisto, sed baldaŭ komprenis, ke mi perdis la direkton kaj rondiras en la sama loko.

De post angulo venis ankoraŭ du egalaj hometoj: ili ĉiuj iris ĉi tie po du aŭ kolumne kaj ial kun fermitaj okuloj.

—Bonvolu diri, kiel mi vidu la sorĉiston Turroputo?

—Oni ne povas vidi, kion volas vidi, se vidas tion, kio ekzistas! — diris la unua hometo.

—Fermu la okulojn, tiam vi vidos, kion vi volas vidi, sed ne kio ekzistas, — diris la dua per la sama voĉo.

—Kiam la okuloj estas malfermitaj, vi vidas tion, kio ekzistas, ranojn, ekzemple, kaj mi terure malamas ranojn.

—Aŭ rozojn, sed mi ne toleras florojn.

—Se vi fermas la okulojn, vi tuj vidas tion, kion vi bezonas.

—Aŭ nenion vidas, kaj tio estas ankoraŭ pli bona.

—Aŭ vi vidas songojn, kaj tio estas agrabla.

—Aŭ ne vidas songojn, kaj sen songoj estas pli trankvile.

Disaŭdiĝis bruego de pezaj paŝoj. Laŭ la longa strato kuris Turroputo. Li estis ankoraŭ malproksime, sed rimarkis min kaj haltis, sufokata de rido:

—Ha-ha-ha! Jen kie vi estas, malgranda kanajlo! Vi bezonas la ŝlosilon de la horloĝo, kiu fine komencis iri

kiel decas — al la pasintaj gloraj, glaciaj, sangaj tempoj. — Turroputo batetis la poŝon de la pantalono, de kie montriĝis la virkoka kapo de la ŝlosilo. — Nun mi prenos vin per tri fingroj, premos ĝis kiam vi hojlos, kaj sidigos en la poŝon. Tie estas darkete kaj sufoke, sed tio ne gravas, post kvardek jaroj vi kutimiĝos, se vi ne kadavriĝos antaŭ tio. Kaj la malsaĝan karbeton, kiu ne estingiĝas, mi ĵetos en la plej profundan puton — ĝi lumu al la bonaj oniskoj kaj bonkonduktaj akvopuloj. Kaj la laĉon, kiu ne ŝiriĝas, mi bruligos. Se ĝi ne ekzistus, ŝtona Silvero transformiĝus en amason da gruzo — enamiĝinta gruzo, hi-hi, kaj la oldulaĉo Ganzelius pro malĝojo vojaĝus al la alia mondo. Jam longe tempas! Hej, egalaj fiuloj! Grizaj kanajloj! Ĉirkaŭigu! Kaptu! Alkonduku! Unudu! Kure ek!

Ĵus la placo ŝajnis esti dezerta, kaj jen de ĉie — el defilejoj, el domoj, eĉ el la tero — komencis aperi la egalaj hometoj.

Ili viciĝis kolumne kaj kun levitaj lancoj kuris al mi.

”La fino . . . Nur Aĥumtus povus savi min”, — sen ia espero pensis mi kaj levis la kapon, por rigardi en la stellan ĉielon la lastan fojon.

Kaj vidis Aĥumtus!

En la hela luna lumo ĝi glitis laŭ kruta ĝiro, kaj poste, kuniginte la flugilojn, sentime ekplonĝis. Kaj ankoraŭ — kion mi tute ne atendis — por helpo hastis la Magis-

tro. Li proksimiĝadis gigantsalte, tenante en la minace levita mano polmaĵon da steloj.

Bedaŭrinde Turroputo ankaŭ rimarkis miajn amikojn.

—Tĵarĉ . . . Tĵarĉ . . . — kriis li, forte svinginte la manojn.

*Ĉio amanta, kantanta, ridetanta,
Pensanta, vivanta kaj kreskanta,
En glacion estas transformanta!
Transformanta!!
Transformanta!!!*

Komenciĝis terura glacia tempesto. La aeron plenigis multaj akraj glacieretoj. Ĉiusekunde densiĝadis la malhelo. Malaperadis steloj. Baldaŭ ankaŭ la luno dronis en inka obskuro.

Per frostitaj fingroj mi eligis la panjan karbeton kaj ĉirkaŭrigardis. Super la urbo pendis glacia volbo sen sola breĉo.

”En glacion estas transformanta! Transformanta!! Transformanta!!!” Do glaciigis kaj mia kara Instruisto, kaj la Magistro, sed kiu pensis pli ol ili? Glaciigis la Princino, kaj glaciigis la ĵus revivinta Silvero, tiel timinde pagante pro la eterna amo? Do la tuta mondo transformiĝis en glacion? Aŭ aliflanke de la malbenita glacia kloŝo la homoj vivas laŭmalnove? Kaj tie atendas min, ne perdante esperon, Aĥumtus kaj la Magistro?!

Mi staris, premita de la vento al ŝtona muro de domo. Malicaj aroj da glacieroj surflugadis, sed la ardo de la karbeto forigadis ĝin. Ĉie ĉirkaŭe ferocis tempesto. La domoj staris duonkovritaj de glacio. La tuta strato estis semita de glaciaj montetoj. Kelkaj el ili moviĝis, kaj mi komprenis, ke tio estas la egalaj hometoj, kurintaj por kapti min, kaj surŝutitaj de la tempesto.

Super la strato kaj la domoj altiĝis la grandega figuro de Turroputo, ankaŭ ĝiszone enigita en la glacian monton.

Oni bezonis uzi la minutojn, kiam la uragano tenas miajn malamikojn en la kaptilo. La vento ĵetis min surteren, kaj mi moviĝis rampante, glitante inter la hometoj.

—Eksteren!

Turroputo eksvingis la manon, kaj la vento tuj kuŝiĝis. — Hej, egalaj fiuloj! Lanternojn! — kriis Turroputo. — Fosilojn, rompilojn! Unua, sepa kaj dektria trupoj — elfosu min! La sesa kaj deka — kaptu la malgrandan kanajlon!

La urbo viviĝis. De ĉie kuris la hometoj. Feliĉe en la malhelo ili nenion vidis, la karbeto lumis nur al mi.

Kiel taŭgis dum tiu punkto la lecionoj pri saltoj kaj krosoj, kiam la kara Instruisto kun sia milda insistado devigis min kuri ĉiutage, kaj kiujn, ŝajnis, tute ne bezonas fabelistoj.

Nur dank' al ili mi ne pereis!

Mi traîgadis sub la piedoj de la hometoj, dekliniĝadis, kure saltadis super ĉenoj de la malamikoj.

—Pli vigle, grizaj laborevituloj! — kriis Turroputo. — Kaptu la kanajlon, aŭ mi ellasos egalajn ratojn, kaj ili voros vin.

Antaŭe preskaŭ vertikale supreniĝis deklivo de la glacia monto, en kies centro staris la Sorĉisto. Mi grimpis laŭ tiu baŭminta glitejo, kroĉante per la manoj dornajn glacierojn kun haŭto deŝirita ĝis sango, sed nove kaj de-nove ruliĝis malsupren. La espero preskaŭ lasis min, kiam mi memoris, ke en la magia kunligaĵo ekzistas tranĉilo. Mi eligis ĝin kaj svinge pikis en glacieron.

”Ĵ-ĵ-ĵ”, — formiĝis ŝtupo. Plia bato de tranĉilo — nova ŝtupo.

Mi rampis laŭ la glacia ŝtuparo kaj, ĉirkaŭrigardante, vidis, kiel la hometoj kun fosiloj kaj rompiloj ĉirkaŭigas la monton. Pala lumo de lanternoj je mia teruro leviĝis ĉiam pli alte. Sed la supraĵo estis proksima.

Jen jam apudas la dika ventraĉo de Turroputo.

Kolektinte la lastajn fortojn mi saltis, kaptis la zonon de la Sorĉisto kaj iris trans bordo de pantalona poŝo de Turroputo kaj laŭ la ŝlosilo, kiel laŭ arbartrunko, glitis en malhelon.

LA MAGIA ŜLOSILETO

Ĉio estis ankoraŭ pli malfacila, ol mi estis supozanta. La ŝlosilo de la horloĝo estis fiksita al ŝtala ĉeneto per ringo, fermita de seruro. Mi ekploris pro senforto.

Estis aŭdeblaj la oftaj batoj de rompiloj kontraŭ la glacieron. Iomete plu, kaj la hometoj liberigos Turroputon el la glacia kaptio. Tiam la eskapo estos neebla. Preminte la orelojn per la polmoj, mi diris al mi: "Pensu dum ne estas malfrue! Kion farus anstataŭ vi Aĥumduŝ kaj la Magistro? Kiel agus metr Ganzelius?"

Subite mi ne memoris, sed kvazaŭ aŭdis la voĉon de la Instruisto:

"Kiam via panjo rigardis kaj rigardis al la ŝlosilo, ĝis kiam fermiĝis por ĉiam ŝiaj okuloj, kaj en si preĝis nur pri unu sola volo: en la plej malfacila minuto tiu ĉi ŝlosilo savu ŝian filon, tiam la ŝlosilo fariĝis magia . . ."

La magia ŝlosileto! Kiel mi povis forgesi pri ĝi! Balanciĝante sur la glita ĉeneto, mi atingis la seruron. Mi tiel emociis, ke eĉ ne povis tuj enmeti la ŝlosileton en la ŝlosilingon. Poste la ringo malfermiĝis, la ĉeneto glitiĝis el sub la piedoj, kaj mi preskaŭ falis en abismon.

Pri tio, kio estis plu, oni povas ne rememori. Ne okazis io neordinara. Mirindis nur tio, kiel mi en ĉio sukcesis dum tiu nokto: mi do estas homo malfeliĉa.

Mi volvis la laĉeton ĉirkaŭ la zono kaj ligis al unu ĝia ekstremaĵo la ŝlosilon de la horloĝo, kaj al la alia la karbeton. Turroputo estis tuta surpendigita de insignoj, medaloj, ĉirkaŭzonita de ordenaj kordonoj. Kaj sorĉista vanteco tre taŭgis. Saltante de medalo al medalon, mi sen embaraso atingis la ŝultron de Turroputo, kaj de tie surgrimpis lian ĉapelon.

La supro de la glacia kupolo de mia prizono estis tute proksima. Aranĝinte min pli oportune, mi komencis tutforte disrondigi la laĉeton kun la karbeto. La karbeto, mi pensis, kiel fajra tranĉilo tratranĉos la glacian, malfermos pordegon al libero, kaj tiam . . .

Tiam mi do trovos manieron forkuri!

Jen mia bona karbeto tuŝis la glacian kupolon kaj precize, kiel cirkelo, desegnis cirklon. Kun ĉiu sekundo ĝi pli profunde eniris la glacian blendon. Degelante kaj krevente, la glacio kvazaŭ ĝemis. "La sorĉisto povas aŭdi la strangajn sonojn, kaj fino al ĉio!" — ektimis mi. Sed ne vane la Instruisto diris: "Malicaj sorĉistoj tiel laŭte krias, ke ili aŭdas nur sin mem."

Ekbrilis strieto de la nigra nokta ĉielo kaj sur ĝi — helhela steleto. Andante fleksiĝante, la strieto de la ĉielo longiĝis kaj longiĝis. La grinco de la glacio fariĝis tiel

akresona, ke Turroputo silentis duonvorte. En la alto malfermiĝis cirklo de stelplena ĉielo, kaj samtempe mi sentis timindan baton, pro kiu misvenis.

Mi rekonsciiĝis de leĝera venteto, ĉirkaŭblovinta la vizaĝon. La kapo min tre doloris. Mi pene malfermis la okulojn kaj vidis Aĥumtus. Ĝi svingis la flugiletojn, kiel ventumilo.

—Kie ni estas? — mi demandis.

—Finfine! — Aĥumtus ekridetis kaj faris profundan elspiron. — Kvietiĝu. Vi estas en libero. Mi rimarkis la karbeton, ni kun la Magistro kaptis la laĉeton kaj ekternis — komence aperis vi, kaj post vi la ŝlosilo.

Mi kuŝis sur la malserene ekbrilanta glacio. Estis horore pro tio, ke tiel proksima estis la urbo de la Egalaj Hometoj, kiu preskaŭ fariĝis por mi eterna prizono. Dekstre nigris cirkla breĉo; tra ĝi oni eltiris min eksteren. Ĉirkaŭrigardinte, mi ekvidis la turon, la aleon de maljunaj kaŝtanarboj kaj la urbodomon. Kaj vidis la Magistron: alte eksaltante, li hastis al la horloĝo.

—Kiel ni emociis dum vi estis tie, — zumis Aĥumtus. — Kiom da fojoj mi diris, ke vi ne povas resti sola, ĉar vi estas tiel juna kaj ankoraŭ ne klerigis vian racion. Sed kio estas por ni konsiloj de amiko, se la naturo gratifikis nin per la spitema kaj malhumila karaktero . . .

Ŝajne, Aĥumtus tute forgesis, kial mi restis sola. Estu tiel. "Forgesita ofendo — sako, ĵetita de la ŝultroj, ofen-

do, kiun vi ne pardonas al la amiko, — ĝibo,” — kutimis ripeti la Instruisto.

—Sed kie estas Turroputo?! — demandis mi.

—Ĉu vi sopiras pri li? — subridis Aĥumtus. Feliĉe, la glaciero vin nur tuŝis, sed lin tiel batis kontraŭ la kapo, ke li ne baldaŭ rekonsciiĝos . . . La Magistro petis nin plej baldaŭ trovi Silveron kaj la Princinon, — post minuto zumis Aĥumtus. — Li tre maltrankviliĝas pro ilia sorto.

Ni leviĝis aeren. Mi turniĝis. Ne estis glacia kupolo, nek Urbo de la Egalaj Hometoj. Ili malaperis same strange kaj subite, kiel ili aperis. Ĉu eble ili iĝis nevideblaj nur por ni, ordinaraj homoj?!

Ĉapitro kvina: *Se vi amas, la rev' plenumiĝos!*

SUB LA KAŜTANARBOJ

Ĉe la maljunaj kaŝtanarboj ni ekvidis la Princinon kaj Junulon. Aĥumtus sinkis sur folion de arbo, ĝuste super ili.

Ne, ili ne parolis pri amo kaj ĉio tia, sed disputis, preskaŭ kverelis.

Sur la kaŝtanarbojn falis nigra ombro; eble tial la Princino kaj Junulo ne estis inklinaj al amkonfesoj. Tre proksime, en distanco de kelkaj paŝoj la teron iluminis la tenera lumo de la luno. Sed la ombro andante surruliĝis la iluminitan spacon.

—Baldaŭ tiu ĉi malbenita ombro de la horloĝo, iran-
ta pasintecen, inundos la tutan mondon, se nur la Ma-
gistro . . . — angore zumis Aĥumtus.

—Malvarme kaj tenebre, — triste diris la Princino.

—Jes, malvarme kaj tenebre, ni do ree estas en la mez-
epoko, — eĥis la Junulo.

—Ĉu morgaŭ oni ree kondukos vin al la Inkvizitoro?

—Jes . . . Morgaŭ, — respondis la Junulo.

—La kompatinda, malsaĝa . . . Kaj vi ree estos ripe-
tanta, ke la Tero giras ĉirkaŭ tiu ĉi malgranda Suno?

—Jes!

—Kaj sub torturo?

—Kion do alian mi povas diri? Koperniko ja pruvis, ke tio estas la vero.

—Absurdo . . . La tuta strato, la tuta kvartalo, la tuta urbo scias, ke tio estas absurda, sed vi gurdas la vian, por ke oni mortigu min kaj vin.

La Junulo silentis, mallevinte la kapon.

—Al ĉiuj estas konate, — adis la Princino, — ke la Suno leviĝas tie, malantaŭ la frukta bazaro. Onjo Petra, kiu plej bone bakas la kukojn kun rabarbo, frue matene iris laŭ la pomaj vicoj kaj vidis, kiel la stulta Suno dormaĉas sub la alero. Onjo Petra ankoraŭ pensis: "Kia grandega ruĝa pomo," levis ĝin kaj faligis — ĝi estis tre varmega. Vi ja kredas al onjo Petra?!

La Junulo silentis.

—Kaj onĉjo Piter, Ĉefo de la Nokta Gardantaro, iris kun patrolo laŭ la bordo de la maro kaj ekvidis vian diskomplezan Suneton, kiu estas al vi pli kara ol mi kaj la vivo. Ĝi plendrinkis ebria kaj sternaĉis sin dum nepermesebla tempo en nepermesebla loko. La onĉjo Piter batis ĝin per la piedo, kaj ĝi momente ruliĝis trans la horizonto en la maron — eĉ ne ekblekis. Ĉiuj do devas obei la determinitan ordon. Vi ja kredas al onĉjo Piter?

—Sed ja . . . — provis komenci la Junulo, sed la Princino ne permesis al li findiri.

—Kaj maljuna onĉjo Inkvizitoro tiel malĝojas, ke vi kontraŭdiras al li, kaj oni estas devigata ree vin pride-
mandi. Vi devas diri tion, kion oni al vi ordonas, tion, al
kio kredas ĉiuj omaĝindaj homoj, eĉ se vi mem ne kre-
das al tio. Alie mi foriros de vi. Mi foriros de vi por ĉiam.

La princino, ne turnante sin, foriris.

Kaj la Junulo staris ĉe la benko sub kaŝtanarbo, kva-
zaŭ denove ŝtoniĝis. Li ne ploris kaj ne petegis, kiel fa-
rus mi kaj ĉiu alia, sed nur diris post la Princino kun sia
stranga suferplena grimaco:

—Du mil libroj estas skribitaj pri maljuna doktoro
Faŭsto, kiu vendis la animon al la diablo por ĉion scii kaj
ĉion vidi. Kial do ekzistas tiel malmultaj libroj pri mili-
onoj da homoj, kiuj vendas la animon al la diablo por
nenion scii kaj nenion vidi?

La Princino foriris ĉiam malproksimen, Aĥumdu-
s timiĝis.

—Do kio, ĉu oni atendu ankoraŭ okcent jaroj ĝis kiam
ili denove renkontiĝos kaj denove kverelos? Do ne! — Ĝi
kolere ekrigardis min. — Je kiu diablo vi rigardaĉas ĉiu-
flanken anstataŭ flugi al la Princino kaj ordoni al ŝi re-
veni.

Mi jam ĉesis atenti ŝian krudecon kaj eble pli trankvile
respondis:

—Unue, mi ne estas tute senpartia persono kaj mi
pene pacigus la Princinon kun la Junulo, kvankam, cer-

te, mi deziras al ili feliĉon. Kaj vi mem dum la tuta tempo zumas, ke mi estas simplulo; kiu aŭskultas simplulon?!

—Absurdo! — preskaŭ ĝemkriis Aĥumdus, eĉ ne fin-aŭskultinte min. — Mi la lastan fojon demandas vin: ĉu vi vere ne diros al la ĉarma pareto, ke ili pli rapide moviĝu el la ombro de la diabla horloĝo? Do tute proksime estas serena luna lumo! Mi konas vin, fabelistojn! Vi ĉiam trovos kaŭzon por resti flanke de interbatiĝo kun la plej nobla aspekto.

Mi terure ofendiĝis.

—Kiel vi povas, do ĵus . . .

—Nu, ne koleru, — ridetante, kvazaŭ nenio okazus, zumis Aĥumdus. — Oni do diras al vi, ripozu, mi mem sukcesos.

Kun tiuj vortoj Aĥumdus startis aeren. Oni do ne tre agrable "ripozas" sur la folio de kaŝtanarbo. Hazarda ventopuŝo deblovas vin. Ĉiu pigra promenantulo-pasero post tempesta nokto povas senintence kolizii kun vi, kiel dirite, — "venena vermeto."

"Ne, ne pri tiu forpaso li revis", — pensis mi pri si, kiel oni skribas en libroj. Sed, en vero, mi ne revis pri ia forpaso.

Feliĉe, Aĥumdus baldaŭ revenis. Ĉu vi pensas, ke ĝi petis pardonon pro sia konduto? Nenio simila. Ĝi estis preskaŭ krevanta pro memkontenteco:

—Sur la selon, kaj ni flugu.

Voje ĝi tuttempe babiladis.

—Mi ne komprenas, kion farus homoj sen mi. Strangaj estaĵoj vi estas. Ĉe ni, muŝoj, tio nomiĝas vantozumado. Ĉu do gravas, kio giras ĉirkaŭ kio — ĉu la Tero ĉirkaŭ la Suno aŭ la Suno ĉirkaŭ la Tero. Muŝo ĉirkaŭ lampeto aŭ lampeto ĉirkaŭ muŝo . . . La Suno! Se tio estus kupra kuvo kun konfitaĵo. Ne, ili trovis, pri kio disputi, viaj laŭdataj Princino kaj Junulo. Sed mi do finĉagrenis ilin. Mi sidiĝis sur la nazojn, mordis ĝis kiam ili persekutis min. Ĵus la unua radio de luna lumo falis sur ilin, la Princino diris: "Aĥ, kiel bonas," kaj li tute nekonvene respondis: "Je Dio, kiel vi belas." Poste ŝi diris: "Mi songis koŝmaron." Kaj li respondis: "Mi ankaŭ songis koŝmaron." Kaj ili proksimiĝis unu al la alia . . . Kial do mi babilas — ni flugu, vi mem vidos.

LA FINO DE LA RAKONTO PRI LA PRINCINO KAJ JUNULO

Mi songîs koŝmaron. Sed nun ĉio pasis. Mi vin tiel amas! — la Junulo etendis la brakojn por brakumi la Princinon.

Nenio simila.

La Princino levis la kapon, rigardis al lian vizaĝon distorditan de suferplena grimaco kaj, retiriĝinte unu paŝon, en teruro ekkriis:

—Kaj vi ĉiam estos tia! Ne paŝu, ne paŝu al mi!

Larmoj ekfluis el la okuloj de la Junulo. Ne, lia vizaĝo tute ne estis timinda.

”Kiel la Princino kruelas,” — mi pensis, forgesinte, ke ŝia koro estas envultita.

—Ĉio vanas, — triste zumis Aĥumtus. — Tie ĉi eĉ mi ne povas helpi.

En tiu sekundo, nekonate de kie, aperis la Korvo. Li flugis al la Princino kaj diris homvoĉe:

—Vi do tiel amis la Junulon ĝis kiam vin envultis Turroputo. Rememoru, rememoru tion. Amu lin, kaj tiam . . .

La Korvo ne findiris.

La Princino turnis sin al la Junulo kaj kisis lin.

La suferplena grimaco en la vizaĝo de la Junulo malaperis, kaj per kia mirakla lumo luminiĝis ĝi. Kaj kiel brilis la vizaĝo de la Princino, nun, kiam la amo denove varmigis ŝian koron. Finiĝis la envulto de la Sorĉisto.

Jen kio estis kaŝita en la vortoj: "Amu lin, kaj tiam . . ."

Mi povus skribi, ke poste estis geedziĝa festo kaj, kiel estas dirate en fabeloj, "mi ankaŭ tie estis, medon kaj bieron drinkis, laŭ la lipharoj fluis, sed la buŝon ne trafis."

Sed mi priskribas nur tion, kion mi vidis mem; estu aliaj elpensonta ĉian ĉiaĵon. Mi ne estis en tiu geedziĝa festo, ĝi certe estis mirakla kaj ĝoja, sed ne por mi.

LA LASTA BATALO KONTRAŬ TURROPUTO

Ŝajnas al mi, ke ĉi tie oni bonege sukcesos sen ni, —
zumis Aĥumdus. — Al la horloĝo . . . Ĝi ial grincas
kaj grincas . . .

Ni sukcesis ĝustatempe. La Magistro kun la ŝlosilo en
la mano grimpis laŭ la glacia ŝtuparo. Kaj Turroputo
estis tie. Feliĉe, li ne tute rekonsciiĝis de la glacierbato
kaj agis ne tro certe. Adaptiĝinte, li kaptis la Magistron
je la piedo.

”Tĵarĉ-Tĵarĉ-Tĵarĉ” — surdige kaj naŭze grincis la
horloĝo.

Inverse al fremda kaj surda jarcent’ . . .

La blinda, la muta.

Al lando de nokto, malvarmo kaj vent’.

Al ver’ krucimita, reganta malver’;

Al leĝoj sangitaj, skribitaj de fer’;

Al kant’, kiun pelas kronita punist’.

. . . La blinda, la muta jarcent’.

Tĵarĉ . . . Tĵarĉ . . . Tĵarĉ . . .

La malvarmo estis ĝuste netolerebla.

—U-u-u-u! Mi frostigos vin! — kriegis Turroputo. —
Transformos vin en glacipendaĵon!

Mi svinge pikis la patrinjan magian tranĉilon en la ruĝan nazon de la Sorĉisto.

—Mi m-m-mortas! Pereas la granda Turroputo, — kriegis la Sorĉisto.

Li per ambaŭaj manoj kaptis la vizaĝon kaj, certe, lasis la piedon de la Magistro, kiu komencis rapide leviĝi al la horloĝo.

La Sorĉisto tuj rekonsciiĝis, sed la Magistro elpoŝigis grandegan stelon de unua magnitudo kaj tiel lerte ĵetis ĝin kontraŭ la frunton de la Sorĉisto, ke tiu, denove hojlinte pro doloro, ruliĝis de la ŝtuparo.

Nun fine la Magistro sukcesis streĉi la horloĝon.

”Donn-donn-donn”, — eksonoris ĝi.

La mallumo svenis, kaj ĉion enverŝis tenera luna lumo.

Donn-donn-donn —

Tiu kanto pri tio, ke

Se vi amas, la rev' plenumiĝos,

Kaj nigra malĝoj' forgesiĝos —

kantis la horloĝo, kiel kantas ĉiuj horloĝoj en la mondo.

Al ili, la horloĝoj, ŝajnas, ke en tiu kanteto estas la plej ĉefa vero.

Sed se la kanteto ne plenumiĝas? Okazas do kaj tiel?!

—Se ĝi ne plenumiĝas, la horloĝo ne kulpas, mia knabo, — diris al mi poste la Instruisto. — Tio estas verema kanto, kaj por ke ĝi plenumiĝu, oni bezonas nur tre forte ami. Kaj batali por sia amo kontraŭ ĉiuj sorĉistoj. Kaj suferi, kaj atendi, se tiel estas juĝite. Kaj esti honesta, se vin eĉ minacas pere.

—Kiel via filo? — demandis mi la Instruiston.

—Jes, kiel Silvero.

Tagiĝis. Varma matena venteto turnadis centojn da ventoflagoj.

—Ni flugu por adiaŭo en la urbodomon, — diris Aĥumduŝ.

Stranga, blua kaj roza lumo plenigis la volban halon. Mi rigardis al la pentraĵo kaj ekvidis la Princinon. Varma brilo verŝiĝis el ŝiaj okuloj. La Morto, starinta antaŭe post ŝia dorso, estis depaŝanta profunden de la pentraĵo. Ĝi estis depaŝanta kune kun la malhelo, kaj kun Buf' la Naŭa, kaj kun ĉiuj liaj timindaj Alfonsioj. Kaj la brilo, verŝiĝanta el la belegaj okuloj de la Princino, fariĝis ĉiam pli hela. Ĝi estis atinganta la volban plafonon de la urbodomo, kaj la vespertoj, nestantaj tie, kun malplaĉa timigita bleko kaŝis sin de tiu lumo, baraktis kaj ien malaperis.

—Adiaŭ! Mi neniam plu vidos vin, — flustris mi, penante teni la larmojn. — Vi ne scios, kiel mi vin amas. Sed vi por ĉiam restos en mia koro tia — brilanta kaj varmiganta per sia brilo la mondon.

—Tempas, knabo, — mallauĵtete memorigis Aĥumodus.

Ni flugis el la urbodomo. Montriĝis la streta defilejo kaj la konata domo sub la tegola tegmento. Denove tio, kio aspektis de malproksime makuloj de humideco aŭ ombroj, kunverŝiĝis en homan figuron. Mi ekvidis la Magistron, ĉu pentritan, ĉu apogintan kontraŭ la muro. Li estis zonita de antaŭtuko, surkudrita de diverskoloraj steloj. La dormeme ridetanta Luno kuŝiĝetis sur lia ŝultro.

Sed la Tondilo ne estis.

Mi ekĝojis pri tio kaj ĵus sukcesis ekpensi: "Kien do ĝi malaperis?", kiam sub la flugilo de Aĥumodus montriĝis malgranda domo, ĉirkaŭata de ĝardeno. Griza maljunuleto staris inter rozoj kaj per la rusta Tondilo tondis nigran kapron. Subite la Tondilo kun malplaĉa grinco glitis el la manoj kaj atakis la plej proksiman rozan arbedon. Ĝi fortranĉus ĉiujn florojn ĝis la lasta kaj eĉ la florburĝonojn, sed la maljunuleto ĝustatempe kaptis ĝin.

—Tenu la Tondilon! — kriis mi al la maljunuleto. — Tenu ĝin pli forte, ne lasu el la manoj, ŝlosu per sep seuroj, alie ĝi faros multan malicon!

Ni flugis laŭ la ĉefa strato. De post angulo ekiris Turroputo. Kian kompatindan aspekton havis la Sorĉisto! La mano estis bandaĝita, sur la okulo estis plastro. La ruĝoblua nazo pufiĝis.

Ni malleviĝis pli malalte kaj mi plenforte kriis:

—Aĉetu batitajn sorĉistojn, rompitaĵojn, malnovajn ĉifonojn, sorĉistajn artifikaĵojn!

Turroputo eksaltis, turbis, kaj milo de ventoj hojlis, giris, kiel malsataĵoj.

Sed Aĥumdu bonorde foriris alten.

La tuta urbo estis kovrita de profunda neĝo. Vendisto pendigis en la vitrino de la magazeno plakaton: "Pro neatendita alveno de vintro malmultekosta disvendo de aŭtunaj kaj someraj artikoloj." Knabinoj modlis neĝulojn kun karotaj nazoj. Knaboj ludis neĝbatalon.

Ni kun Aĥumdu flugis tra la vazistaso en la ĉambron de la gastejo, de kie tiunokte ni komencis la vojaĝon.

Ĉapitro sesa: *La reveno al la Instruisto kaj la adiaŭo*

LA PLIIGILO

Al la afero! — zumis Aĥumodus.
Kune kun ĝi ni streĉigis — unu . . . du . . . samtempe, unu . . . du, — starigis la tablojdon de la pliigilo sur la eĝon kaj rulis al la rando de la tablo.

La tablojdo falis kaj disrompiĝis multfragmente. Aĥumodus portis min sur la plankon, kaj mem forflugis en sian dometon.

Mi komencis nemaĉante gluti pecetojn da la pliigilo, kuŝantajn ĉirkaŭe.

Kaj tuj grandiĝis dekoble, dudekoble, centoble.

Kaj sentis min grandegulo, kvankam estis ankoraŭ malpli alta ol la seĝo. Mi glutadis la pecetojn da la pliigilo kaj ĉiam kreskis kaj kreskis. Ŝajnis, ke mi kreskis ĝis la ĉielo, kaj se mi eliros en la straton, mi devos klini la kapon por ne forbati la sunon. Sed vere mi kiel ne estis antaŭ ĉiuj ĉi eventoj altkreska, tiel restis. Eĉ fariĝis ses centimetrojn malpli alta, ĉar kelkaj eretoj da la pliigilo forruliĝis kaj oni ne sukcesis ilin eltrovi.

Mi ne afliktiĝis pro tio, ke mi fariĝis malpli alta, ĉar mi donis al mi la vorton ĝis fino de la vivo ne rigardi al iuj princinoj, eĉ se en la mondo ekzistus aliaj princinoj.

Kaj se vi estas sola — kia diferenco, ĉu vi estas altkreska aŭ ne. Neniun tio tuŝas.

—Tempas, — zumis Aĥumduŝ, sed mi ne povis tiel facile adiaŭi kun ĝi, tiom da fojoj savinta mian vivon. Mi petis ĝin atendi dum minuto kaj malsuprenkuris laŭ la ŝtuparo en la bufedon. Post la verŝotablo dormis dika bufedisto. Pene mi puŝvekis lin. Sed li nur grumblis: "Atendu ĝis la mateno," kaj denove ekronkis. Tiam mi ekruzis; la simplulo do povas ankaŭ ion ellerni.

Mi denove puŝvekis la dikulon kaj diris al li:

—Vi simple ne havas konfitaĵon kaj neniam havis, tio, kio ekzistis, acidiĝis kaj estis formanĝita de musoj. Kaj vi estas ordinara fanfaronulo.

Li ĝuste senspiriĝis pro indigno.

—Ĉe ni do, en nia fama bufedo ne ekzistas konfitaĵo?

Post minuto antaŭ mi aperis pleto, kie staris teleretoj kun ĉiuj specoj da konfitaĵo, kiuj ekzistas en la mondo.

Aĥumduŝ grumblis: "Kial tio ĉi?" sed mi bonege vidis, kiel ĝi ekĝojis.

Kia festeno ĉe ni okazis!

Poste mi portis Aĥumduŝ en Oficejon por varbado de kurmuŝoj.

—Ĉu vi havas plendojn? — demandis la oficejestro. Mi respondis, kiel mi pensis, ke Aĥumtus estas la plej bela, brava kaj saĝa muŝo en la mondo.

—Adiaŭ, mia knabo, — zumis Aĥumtus.

—Adiaŭ, fratinjo! — respondis mi.

LA INSTRUISTO

Mi eliris sur la straton kaj moviĝis tien, kien montris la ventoflago. La neĝo fordegelis, varmigis la suno. En la magazeno, kie pendis la plakato "Pro neatendita alveno de vintro malmultekosta disvendo de aŭtunaj kaj someraj artikloj", oni pendigis alian afiŝon:

"Ĉar la somero revenis, oni malmultekoste vendas vintraĵajn aĵojn."

La strato kondukis min al stacidomo. Ĉe fenestreto de la biletejo mi komprenis, ke mi ne scias, ĝis kiu stacio mi devas veturi. Sed el la fenestreto rigardis nia Kolombo, kiun mi tuj rekonis, kvankam mi ne montris tion.

La biletisto-Kolombo donis al mi biletan, iris el sia ejo kaj kondukis min al la trajno.

En malplena kupeo mi kuŝiĝis kaj tuj ekdormis. Post la pasinta nokto mi dormis tiel firme, ke la kondukanto pene puŝvekis min. Sur perono min atendis la Korvo. Ĉifoje li ne devis porti min en la beko: mi iomete ellernis rajd- kaj flugarton, kiam mi flugadis kun Aĥumdus.

Meze de la kampo kun bluaj kampanuloj montriĝis nia kara, malnova traba domo, surkreskita de griza musko. La Instruisto staris sur la sojlo; li ekridetis kaj

svingadis la manon, kaj mi saltis de la Korvo kaj rapidege ĵetis min al li. Aĥ, kiom mi sopiris pri la kara metr Ganzelius, kvankam mi ja ne vidis lin nur dum unu tag-nokto.

Mi komencis rakonti al la Instruisto pri ĉio, kio okazis, penante nenion preterlasi, sed baldaŭ komprenis, ke li jam ĉion scias.

Kiam mi parolis pri Aĥumtus, la Instruisto ridetis:

—Ĉu ĝi moknomis vin simplulo, mia knabo?! Ĉu vi ne estis ofendita de ĝi?

—Ne, — respondis mi. Do ekzistas verŝajne multe pli ofendaj alinomoj. Mi nur ne memoras, kiuj.

—Timulo, — pensinte diris la Instruisto. — Tio estas la plej ofenda alinomo.

—Do kaj mi ne estas kuraĝulo, — konfesis mi.

—Timulo ne estas tiu, kiu timas kaj venkas timon, sed tiu, kiu pro timo fariĝas mensogulo kaj perfidulo.

Malheliĝis, denove alpaŝis nokto, kaj en la ĉielo lumiĝis la mirinde brila kaj grandega luno.

—Tempas adiaŭi, knaboj, — diris la Instruisto per malforta voĉo, alparolante la Korvon, Kolombon kaj min. Nur nun mi vidis, kiom li maljuniĝis dum ni ne estis hejme. — Kiam Silvero estis ŝtona, dum tiu ĉi centoj jaroj, — daŭrigis la Instruisto, — mian koron ankaŭ premis ŝtono. Kaj hodiaŭ tiel leĝeras. Kaj mi havas iun, al kiu lasi la domon. Mia tempo alvenis, knaboj.

Mi ne sukcesis ion diri, eĉ ne komprenis, kio okazas. La Instruisto leviĝis, etendiĝis je tuta staturo kaj saltis mezen sur lunan radion. Dum kelkaj sekundoj mi vidis lumantajn verdajn punktojn, poste ili proksimiĝis al la fenestro kaj malaperis.

Dum tuta nokto ni atendis, sed la Instruisto ne revenis. Antaŭ tagiĝo mi eliris en la korton kaj demandis la Krucbekulon, kiu, kiel ĉiam, pendis sur la abio kaj rigardis en la ĉielon:

—Ĉu vi ne vidas la Instruiston — tie, en la luno? Li estas facile rekonata laŭ la verdaj lumantaj ŝuoj.

—Ne, respondis la Krucbekulo grincvoĉe. — Kvankam mi estas terure akrevida, sed ĉu de la tero oni rigardos la ŝuojn, eĉ se ili lumas?

—Kion mi faru? — en despero demandis mi.

—Vi scias kion, — post longa silento diris la Krucbekulo. — En la luno ekzistas 244 517 lunaj hometoj. Se vi ilin kalkulos kaj estos 244 518, sekve, la Instruisto estas tie. Sed tio estas tre malfacila — kalkuli ĉiujn lunajn hometojn.

—Bonvolu, kara Krucbekulo, kalkuli. Ja nur vi povas tion fari.

—Tio veras, — grincis la Krucbekulo. — Oni diras, ke doktaj homoj havas teleskopojn, sed nur ni, la krucbekuloj, vidas la lunajn hometojn.

Li komencis kalkuli en la sama nokto. Kaj ĝis mateno kalkulis cent dudek lunaj hometojn. Kaj dum la sekvinta nokto — mil kvindek! Poste li miskalkulis, kaj devis komenci de komenco. Ĉifoje li kalkulis ĝis dek mil tricent kaj denove miskalkulis. Kaj poste ĉio iris bone, li kalkulis ĝis cent mil kaj jen rememoris, ke plu kalkuli li ne scipovas; iam scipovis, sed forgesis.

Tiel ni restis solaj — la Korvo, Kolombo kaj mi. Tre angore estas en mia koro sen la Instruisto.

Mi scias, ke longe ripozi mi ne sukcesos. Hieraŭ en la fumtubo ekhojlis glacia vento kaj hojladis dum tuta nokto.

Turroputo estas proksima! Sekve nova renkontiĝo kun la Sorĉisto ne estas eskapebla.

Mi ne timos. Mi ne havas rajton por timi . . . Al mi ŝajnas, ke la Instruisto ne kondukas de mi siajn akrevidajn okulojn.

”Donn-donn-donn”, — batas la horloĝo.

Mi aŭdas ĝian sonoron kaj kredas al ĝia kanto.

Ŝarov (vera nomo Njurenberg) Aleksandro Izraileviĉ (1909 — 1984) — rusa verkisto. Libroj: "Retiriĝo de tundra" (1936), "Vivo venkas" (1950), "La malgrandaj estiĝas grandaj" (1957), "La rivereto de la olda kastoro" (1958), "Sorĉistoj venas al homoj" (1974), "Rakonto pri la dek eraroj" (1982), "La horizonto" (1990) kaj aliaj.

PRI LA TRADUKINTO

Naskiĝis en 1961 en Siberio (urbo Novokuznezko). Lernis Esperanton en 3-monataj kursoj ĉe la Omska regiona librejo je la nomo A. S. Puŝkin dum studado en la unua kurso de la Omska supera lernejo de milito (1979). Nun li estas juristo en fako de civila juro. Loĝas kaj laboras en "La patrino de siberiaj urboj" — Tjumeno.

Kiel esperantisto li "reviviĝis" en aĝo de 40, post pli ol 20-jara interrompo.

Kiel preteksto por tiu ĉi traduko servis la deziro prezenti al eksterruslanda leganto la plej ŝatatan libron de lia infaneco.

www.omnibus.se/inko

ISBN 91-7303-207-7